# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ helmikuu ◆ februaro ◆ 1/2005




*Bela kaj rebela. Klavaristo de Dolchamar kun ĵus eldonita disko.*

*Dolchamarin kaunistus, kosketinsoittaja Leena Peisa ja uunituore levy.*

*Artikoloj sur p. 3, 10 & 28*

## Venontaj: VT, Valamo, KEF, p. 17-25

**Nova ĉefdelegito serĉata, p. 26 ◆ Euroscola, p. 8**

**Popularmuziko de Vittula: Esperanto en la filmo, p. 12**

# ESPERANTOLEHTI

**Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet** ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.
Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.
Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo**: 🖳 eaflehti@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*
Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 🖳 ef_redakto@tiscali.fi
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*
Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 🖳 ilkka.santtila@esperanto.fi
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 15 e/vuosi/år/jaro;
Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 e.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 🖳 eaf@esperanto.fi
Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Eldonkvanto: 400


## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja:** *Anna Ritamäki*
Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 🖷 (02) 423 246 🖳 eafprezidanto@esperanto.fi
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 🖳 paivi.saarinen@iki.fi
**Sekretario/Sihteeri:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 🖳 eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:** tuomo.grundstrom
*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 🖳 @lailanet.fi
*Taneli Huuskonen*, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 🖳 taneli.huuskonen@netsonic.fi
*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 🖳 markku.saastamoinen@jippii.fi
*Auli Vihermä*, Riisikuja 11 G, 90460 Oulunsalo. ☎ (08) 554 5587 🖳 auli.viherma@pp.inet.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet:**
*Timo Pirinen*, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 🖳 timospi@suomi24.fi
*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 🖳 saliko@kase.fi
*Eero Rinta-Karjanmaa*, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

**Kasisto/Rahastonhoitaja:** *Anna-Liisa Heikkinen*
Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 🖳 eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

**Oficejo/Toimisto:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.
☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/aŭtomata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja:** *Heta Kesälä*
Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎🖷 (09) 275 5528
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

**Internet**: http://www.esperanto.fi



# Rebelige elŝrankiĝas esperanto

Dolchamar ribelas kaj per sia nova disko Rebela sono, rebeligas – aŭ almenaŭ aktualigas – esperanton inter la ĝenerala publiko. Ne ĉiujn tiu mirindaĵo atingis, sed multaj estas la iom tuŝitaj legantoj de gazetoj kaj magazinoj, kaj paperaj kaj retaj, aŭskultantoj de junularaj, babilaj kaj muzikaj radioprogramoj. La mesaĝo eĉ atingis la spektantojn de la televidaj kulturnovaĵoj la tagon post la lanĉokoncerto.

Ne multis la minutoj en televido, sed tamen, tie li staris, Patrik Austin, misikonvinke prezentanta la nunan tempon matura por esperanto. Estis granda intereso iam, sed venis la militoj, estis problemoj. Nun venis la interreto, la faciligitaj kontaktoj. Patrik, instigite de la intervjuato, parolis en esperanto kaj la iom neekzakta teksttraduko peris la mesaĝon. La etoso fortigis ĝin: jen io reala kun vera signifo.


Tio ĉio donas novan instigon al miaj cerbumoj pri la esenco de esperanto, pri ĝia eksterordinareco kiel fenomeno kaj ĝia normaleco inter la lingvoj. Ordinara spektanto, eble konatiĝante kun Dolchamar nur je preterpasa rigardo, evidente ne tiom emocias pri la afero kiel mi. Tio tamen iom paradokse plaĉas al mi kaj entuziasmigas min. La elstarigita trajto, kiu vekis la intereson, estis la lingvo esperanto. Tio estis rezulto de konscie realigita diskolanĉo, de tute normala aliro. Ja ĝuste similan interesovekon kutime alstrebas eldonantoj de diskoj, ĉu en esperanto, ĉu sen tia trajto. Sufiĉe eksterordinare, sed jam iom ordinare.

Miroplene, kaj foje eĉ iom ŝokita, mi sekvis la rezultojn de la lanĉo. Samtage, en la svedlingva junulara Radio Extreme, Patrik kaj la kunbandano Hannu Linkola respondis nature, ne per amaso da parkerigitaj faktoj, sed per siaj propraj pensoj kaj taksoj. Sekvatage en la pli plenkreskula Radio Vega, dum longa intervjuo, Patrik anoncis sian neŝaton de la ĉapelitaj literoj. En la sekvasemajne aperanta Studentbladet, en tutpaĝa intervjuo, li anoncas ke la bando devis multe barakti kun la diskeldonejo pro siaj lingvaj preferoj. Li eĉ anoncas – ho, ve, ekster niaj internaj rondoj – ke li opinias ke esperanto estas malnovece stagninta kaj aludas riskon de sorto simila al tiu de la latina aŭ prasumera. Dolchamar konscie uzas la lingvon preter la reguloj kaj tion anoncas senhonte.

Jen, ne nur la mondo estas pli matura, ankaŭ esperanto jam estas tiom matura lingve ke ĝi eltenas la ludemon de artistoj. Esperanto estas tiom forta fenomene ke ni, prezentante ĝin al la mondo – elŝrankiĝante, laŭ la sama studentgazeta intervjuo – ĉiu povas prezenti ĝin tia, kian ni persone ĝin spertas.

*Anna Ritamäki*

PS. Nepre ne miskomprenu min! Dolchamar neniel trompis miajn esperojn, sed mi seniluzie preferas elreviĝi pri desapontiĝoj ol pri desapoentoj. Kaj kvankam geproximuloj ne timigas min, mi senhezite preferus geproksimulojn. Por kompreni, havigu la diskon, kaj eltenu ĝin respondece!



# La plej granda finno elektita

Aŭtune 2004 nin diskutigis televida serio, kie oni elektis la plej grandan finnon. La rezultojn la televido publikigis la 5-an de decembro, antaŭtagon de la memstariĝo de Finnlando.

La nomumon akiris Carl Gustaf Emil Mannerheim, oficiro, komandanto de la armeo kaj prezidento de Finnlando en jaroj 1944–1946. La venko povas esti konsiderata eĉ klara, Mannerheim ricevis 104 000 voĉojn el tuto de 363 000 voĉoj, dum la due plej favorata kandidato ricevis 80 000.

Oni povas facile kritiki la koncepton voĉdoni pri la plej granda homo de la nacio. Certe oni ne povas tre juste kompari la signifecon de homoj el diversaj agkampoj, kiel politikistoj, artistoj kaj sciencistoj. Kaj certe ne indas, ke nacio levu nur unu eminentulon sur apartan podion, ĉar estas amaso da homoj kiuj faris por la nacio signifajn aferojn. La plej bona flanko de tia voĉdonado tamen estas, ke ĝi instigas homojn studi pri agoj de diversaj agantoj kaj analizi siajn preferojn pri valoraj agoj por formi sian opinion pri la plej grava persono. Almenaŭ mi tiucele tralegis kelkajn biografiajn artikolojn kaj lernis valorajn sciojn.

Se oni komparas la grandulajn listojn de Finnlando kaj aliaj landoj – simila elekto ĝis nun okazis en almenaŭ Britio, Germanio, Nederlando kaj Kanado – percepteblaj estas kelkaj similecoj, sed ankaŭ diferencoj. En ĉiuj landoj la pinton okupis politikistoj kaj militaj estroj, dum artistoj kaj sciencistoj ĉie atingis nur poziciojn iom post la pinto. Bone reprezentitaj en ĉiuj landoj estis agantoj de la eraoj, kiam la ŝtato kaj nacio formiĝis, kaj kiam ĝia ekzisto iĝis minacata.

Pri la finna listo elstaras tio, ke pinto de kvin estas tute okupata de prezidentoj kaj militestroj. Tion mi konsideras bona ilustro de la tipa finna firma kredo je aŭtoritatoj. Plene mankas al nia pinta dekopo malkonvenciaj alternativuloj – tiaj troviĝas nur en malpli altaj pozicioj: 14-a estas Lalli, kiu laŭ antikva legendo en la 12-a jarcento mortigis eksterlandan invadinton; 17-a estas televida humuristo Spede Pasanen; kaj 18-a estas ekstreme ekologiisma verkisto Pentti Linkola.

Tute alian karakteron havas la nederlanda listo: La plej granda nederlandano estas Pim Fortuyn, dekstrisma politikisto, kiu antaŭ paro da jaroj iĝis mortigita pro siaj malkonvenciaj opinioj.

*Mikko Mäkitalo*

### La plej grandaj finnoj

1. C. G. E. Mannerheim, oficiro, prezidento 1944–1946.
2. Risto Ryti, prezidento 1940–1944.
3. Urho Kekkonen, prezidento 1956–1982.
4. Adolf Ehrnrooth, oficiro, komandanto en militoj de la 1940-aj jaroj.
5. Tarja Halonen, la nuna prezidento (unua virina en Finnlando) ekde 2000.
6. Arvo Ylppö, kuracisto, disvolvinto de infankuraca sistemo dum la 20-a jarcento.
7. Mikael Agricola, episkopo en la 16-a jarcento, fondinto de skriba finna lingvo.
8. Jean Sibelius, komponisto fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcento.
9. Aleksis Kivi, verkisto en fino de la 19-a jarcento, fondinto de finnlingva beletro.
10. Elias Lönnrot, verkisto kaj esploristo pri popolaj kantoj en 19-a jarcento. (Verkinto de la nacia epopeo Kalevala, kiu estas ankaŭ tradukita en Esperanto.)

# C. G. E. Mannerheim

***Kia homo estis Carl Gustaf Emil Mannerheim, la plej granda finno?***

Li apenaŭ estas la plej fama finno eksterlande – mi kredas, ke tiun postenon meritus iu de niaj nuntempaj aŭtosportistoj aŭ kursportisto Paavo Nurmi, kiu en la 1920-aj jaroj ”kuris Finnlandon sur mondmapon”, aŭ eble komponisto Jean Sibelius aŭ verkisto Mika Waltari. Sed ankaŭ Mannerheim ne restis tute nekonata eksterlande. Tion indikas i.a. tio, ke mi antaŭ ne longe renkontis onidiron, ke iu eksterlandano kredis, ke Mannerheim estis ruso, kiu estis prezidento de Finnlando.

Tiu kredo ja estas malĝusta, C.G.E. Mannerheim estis finno, naskiĝinta jare 1867 en sudokcident-Finnlanda komunumo Askainen. Sian bazon la kredo pri ruseco de Mannerheim ja havas en tio, ke li la unuan duonon de sia plenkreskula vivo estis oficiro en armeo de Rusio. Tiutempe ja Finnlando estis parto de la Rusia imperio, sed aŭtonoma, kun propra civitaneco kaj ekzemple propra armeo – el kies oficira instituto junula Mannerheim iĝis pro malbona konduto elpelita kaj post tio decidis aliĝi al la rusa armeo.

En Rusio Mannerheim estis ne nur oficiro, sed iĝis ankaŭ esploristo pri etnoj de meza Azio, ĉar la rusa armeo ordonis lin al ĉevala esplorvojaĝo tra limregionoj de Rusio kaj Ĉinio. Kvankam la eduko de Mannerheim estis ne scienca kaj la vera celo de la vojaĝo estis militstrategia kaj spiona, lia dediĉiĝo al la observa tasko produktis aron da fotoj kaj etnografiaj notoj, kiuj evidentiĝis valora etnoscienca materialo.

Reen al Finnlando Mannerheim-on portis la revolucio en Rusio jarfine 1917. Ne plu ekzistis la cara Rusio, kies armeo ĝis tiam estis la dunginto de Mannerheim, kaj decembre 1917 memstariĝinta Finnlando bezonis komandanton por sia armeo. Tio estis Mannerheim unue dum la interna milito 1918, kaj tio li estis poste dum la militaj jaroj 1939-1946.

Inter la militaj tempoj Mannerheim faris ankaŭ humanistan karieron. En jaro 1920 li fondis infanprotektan asocion, kiu, ankoraŭ portante la nomon de Mannerheim, nuntempe estas prestiĝa kaj estimata organizo. En la 20-aj jaroj li en posteno de prezidanto de la finna Ruĝa Kruco novorganizis ĝin.

Prezidentan postenon Mannerheim prenis en aŭgusto 1944, en malfacila situacio de milito minacanta la ekziston de finna ŝtato. Sendube politike dekstrisma, sed ne reprezentanto de iu ajn politika partio, li estis konsiderata la homo sufiĉe prestiĝa por tiam gvidi la nacion. El prezidenteco li demisiis printempe 1946, laciĝinta kaj proksimiĝanta sian 80-an naskiĝtagon.

Edwin Linkomies, politikisto kaj literatura sciencisto, en jaro 1959, kvazaŭ antaŭvidante la elekton de la plej granda finno jardekoj pli poste, skribis pri Mannerheim: ”Sendube ni povas diri, ke li estas la plej brila karaktero en historio de Finnlando. Ne ekzistis finno, kiu same kiel li brillumis siajn samtempanojn. Nek ekzistis alia finno, pri kiu al posta mondo konserviĝus tiom hela memoro kiom pri li.” Same antaŭvidante oni en junio 1960 rivelis en plej centra loko en centro de Helsinki monumentan statuon pri rajdanta Mannerheim.

*Mikko Mäkitalo*



# Preskaŭ najbara Litovio


Litovio kaj Finnlando estas preskaŭ najbaroj, ili troviĝas sur orienta bordo de Balta Maro kaj ilin apartigas nur 400 km. Ankaŭ nombro de loĝantoj ne tre diferencas. Oni opinias, ke antaŭ la Dua Mondmilito en ambaŭ landoj estis simila vivnivelo. Komploto inter Hitler kaj Stalin por ambaŭ landoj preparis la saman sorton, sed finnoj kontraŭstaris al tiu perforto, dume gvidantoj de Litovio preferis ”ŝpari sangon” kaj la lando por 50 jaroj trafis en sferon malantaŭ ”fera kurteno”.

Feliĉe, neniu imperio estas eterna, disfalis ankaŭ la soveta. Jam 14 jarojn Litovio denove estas sendependa ŝtato. Tiu nova periodo de libero estas taksata diverse: sufiĉe granda grupo da homoj, kiu atendis tujan miraklon, devis disreviĝi, ĉar grandaj ŝanĝoj ne povas okazi fulmrapide. Transiro de planita ekonomio al kondiĉoj de libera merkato kaŭzis malagrablaĵojn: bankrotis gigantaj uzinoj de soveta tempo, homoj perdis siajn ŝparaĵojn, kreskis nombro de senlaboruloj. Malaltaj salajroj kaj pensioj ne kontentigas multajn kaj pesimisma triono de loĝantaro agnoskas tiun periodon la plej malsukcesa en historio de Litovio.

Sed ne ĉio estas tiel malbona – ne eblas ne rimarki bonajn ŝanĝojn: anstataŭ malplenaj vendejoj aperis modernaj magazenoj, la stratoj plenas de aŭtomobiloj. Inflacio estas bridita, kreskas malneta nacia produkto, en la lando vivas kaj evoluas demokratio. La politika sistemo estas stabila, pri tio atestas eĉ pasintjara konstitucia forigo de ŝtatprezidento.

Nacia konsisto de Litovio estas pli homogena ol tiu en Estonio kaj Latvio: litovoj konsistigas 83,5 % da loĝantaro. Plej grandaj naciaj minoritatoj estas poloj (6,7 %) kaj rusoj (6,3 %). Ili havas nacilingvajn lernejojn, gazetojn, organizojn. La juna generacio de poloj kaj rusoj jam perfekte parolas litovan lingvon, do ili ne spertas problemojn studante en superaj lernejoj nek serĉante laboron.

La plej gravaj eventoj de la jaro 2004 estis agnoskitaj: membriĝo al NATO kaj al Eŭropa Unio. Ankoraŭ estas tro frue paroli pri gajnoj aŭ malgajnoj de tiu aliĝo. Nur senpacienculoj povus eldiri sian malkontentecon. Plimulto komprenas, ke tio estas nur ŝanco atingi bonajn rezultojn en estonteco. Oni prognozas, ke ni necesos ĉirkaŭ 30 jarojn por atingi vivnivelon de okcidenteŭropaj landoj, kiuj ne spertis fenomenon de ”fera kurteno”. Problemo estas tia, ke homoj dum 50 jaroj dekutimiĝis mem solvi siajn malfacilaĵojn, ili atendas, ke tion faru ŝtato kaj registaro. Esperojn vekas nova generacio, kiu estas pli iniciatema kaj aktiva. Krome litova



popolo ĉiam distingiĝis per sia laboremo.

Jam cirkulas paroloj pri enkonduko de eŭro – tio povas okazi komence de la jaro 2007. Unu el kondiĉoj de membriĝo al EU estis fermo de Atoma Elektrocentralo en Visaginas – Eŭropo timis ripeton de Ĉernobil. La unua bloko laŭ interkonsento jam ĉesis funkcii la 31an de decembro 2004, la dua ankoraŭ funkcios ĝis la jaro 2009. Tamen oni jam diskutas pri konstruo de novtipa pli sekura nuklea reaktoro.

Lastatempe oni rimarkas malkreskon de senlaboreco, sed tion grave influis ebleco libere elveturi kaj serĉi laboron en eksterlandoj. Centmiloj da junaj homoj forveturis kaj laboras en Irlando, Britio, Hispanio, Usono. Parto da ili perdiĝos por ĉiam, sed plimulto perlaboros la monon kaj iam revenos. Tiu elmigrado nun fariĝis grava problemo, kaj ne nur en Litovio.

En la jaro 1009 en Kvedlinburgaj analoj unuan fojon estis menciita nomo de Litovio (Litua), do post 4 jaroj ni festos jarmilon de tiu evento. Ĝis tiu dato en Vilno estos rekonstruita Palaco de Regnestroj, intence detruita de carisma reĝimo. Sed por esperantistoj sendube grava estos la jaro 2005, ĉar somere en Vilno okazos jubilea 90a Universala Kongreso de Esperanto. Multaj finnaj samideanoj jam vizitis Litovion, partoprenis en BEToj. Ni esperas, ke ankoraŭ pli multe da ili ĉi-somere venkos tiun malgrandan distancon. (Ĝis la unua de januaro al UK aliĝis 43 finnoj.) Ja ankaŭ aŭtovojo de Finnlando al Centra Eŭropo (la fama Via Baltica) iras tra Estonio, Latvio kaj Litovio.

*Petras Celiauskas*

***Bildo: Malnovaj konstruaĵoj en Vilnius.***

## IJK en Zakopane, Pollando

Internacia Junulara Kongreso estas la plej granda junulara renkontiĝo dum la jaro. La lasta 60-a kongreso okazis en Rusio. Ĉu vi scias, kie okazos la sekva? En la belega, folklora, montara, senkula urbo Zakopane en Pollando. Ni invitas vin tien en la semajno 31.07.–07.08. 2005.

La kongresa temo estas ”Egalrajteco – unueco en diverseco”. Ni proponas interalie lingvan festivalon por prezenti riĉon de eŭropaj (kaj ne nur) lingvoj. Krome aperos temoj pri komunikiloj de blindaj kaj surdaj homoj, kio tuŝas egalrajtecon de handikapuloj. Sed tio ne estas ĉio. Per diskutgrupoj, prelegoj kaj aliaj programeroj ni volus diversforme prezenti laŭeble multajn aspektojn de egalrajteco!

Krom laŭtemaj aranĝoj certe okazos multegaj E-diskutoj, belega ekskurso al sal-minejo Wieliczka, prezentado de E-filmoj kaj tutnoktaj diskotekoj. Vi spertos nekredeblan etoson!!! Vi povos viziti la Nacian Parkon de Tatry-montaro kun lokaj bestoj: ŝafoj, marmotoj, ursoj kaj ĉamoj.

Ni planas organizi ĉiutagajn ekskursojn al montaro, instruadon de polaj popoldancoj kaj partoprenon en elfarado de montarana fromaĝo el ŝafa lakto. Vi neniam forgesos ĝian guston kaj odoron :) Ĉu vi iam revis pri kariero de filma stelulo aŭ reĝisoro? Se jes, tiam dum IJK vi povos plenumi tiujn revojn!

Pliajn informojn vidu en la ttt-ejo *http://www.tejo.org/ijk*, kaj atentu aliĝi antaŭ la 1-a de majo (malrabato por aliĝi malpli frue).




***Unu el multaj folkloraj domoj de Zakopane.***

# Eŭropa amikeco en la koro de Eŭropo

En fina aprilo 2004 grupo de ĉirkaŭ 30 finnaj junuloj kaj iliaj tri geinstruistoj partoprenis kvartagan seminarion en Strasbourg ĉe la germania limo de Francio. Post la unua nokto en la najbarlanda Frankfurt am Main ni renkontis iujn alilandajn esperantistojn – unu ĉeĥon, du albanojn kaj kelkajn rusojn – kiuj aliĝis al ni en nia vojaĝo. Vespere junulaj grupoj de Slovenio, Pollando, Britio kaj Ukrajnio ankaŭ alvenis en la Regionan centron de popola kaj sporta eduko (CREPS) kie okazis la evento.

La sekvantan tagon la seminario komenciĝis. La angla instruistino Elizabeth Stanley enkondukis la partoprenantojn en la historio de la Eŭropa Unio kun sia komuna mono. Poste sekvis la prelegoj de sloveno Zlatko Tišljar pri socilingvaj aferoj kaj de nia propra lapona instruisto Pekka Välimäki pri mediprotektado.

La junuloj estis dividitaj en kvin multnaciajn grupojn kiuj prepariĝis por la sekvonta Euroscola-okazo. La temoj estis sekvaj: 1) ”Demokratio en Eŭropo”, 2) ”Medio”, 3) ”Eŭropaj valoroj en la mondo”, 4) ”Junuloj” kaj 5) ”Estonteco de Eŭropo”. La diskutoj kondukiĝis prefere esperante, sed aliaj lingvoj ankaŭ akceptiĝis se la grupanoj ne sciis sufiĉe bone Esperanton.

Mia grupo, la tria, koncentriĝis al la kultura kaj lingva diverseco de Eŭropo kaj al homaj rajtoj de la eŭropano. Jen kelkaj ideoj el nia rezolucio:

- Ni volas ke la lingva diverseco de Eŭropo longe vivu.
- Ni volas ke ĉiuj havu la eblecon uzi siajn gepatrajn lingvojn kaj studi en tiuj lingvoj en siaj patrujoj.
- Ni ne volas ke homoj devige lernu fremdan lingvon, sed ili havu la eblecon libervole lerni plurajn fremdajn lingvojn.
- En la kazoj kiam komuna lingvo estas bezonata, oni racie kaj serioze pritraktu ĉiujn eblajn solvojn sen politikaj antaŭjuĝoj.

Post la serioza parto de gruplaboro ni interkonatiĝis kun sam- kaj alilandaj junuloj. Ĉiuvespere ni havis ludprogramojn, kantojn, interesajn kaj amuzajn prezentojn ktp. Ni ankaŭ vizitis la centron de Strasbourg kelkfoje kaj konatiĝis al la franca ”mode de vie”.

En la lasta tago antaŭ reveno hejmen ni partoprenis en la Euroscola-tago en la Eŭropa parlamentejo. Tie kolektiĝis ĉiuj partoprenantoj de la Esperanto-seminario sed ankaŭ aliaj junuloj – plejparte gimnazianoj – el malnovaj kaj venontaj membrolandoj de la Eŭropa Unio. Tio ja okazis nur kelkajn tagojn antaŭ la vastiĝo de la Unio 1an de majo 2004.




***Miikka-Markus bone konas krom la naciajn lingvojn de Finnlando kaj esperanton ankaŭ la anglan kaj la francan kaj preskaŭ tute ne bezonis la interpret-aŭskultilon por kompreni kion oni diris en la EU-parlamentejo.***

Post prezentadoj de la laboro de la parlamento kaj de ĉiuj partoprenantaj gimnazioj, formiĝis laborgrupoj pri samaj temoj kiujn ni jam diskutis dum nia seminario. En mia grupo la lingvaj rajtoj leviĝis por esti unu de eŭropaj valoroj kiujn oni akceptis en la rezolucion. Aliaj estis pli ĝenerale ligitaj al temoj kiel paco, sekureco, justeco kaj homaj rajtoj. Inter la ne-esperantistaj junuloj la lingvaj kaj kulturaj rajtoj de malgrandaj popoloj estis tre malbone konataj. Iuj eĉ pretendis ke minoritatoj ne ekzistas en la plejparto de eŭropaj landoj.

La seminario kune kun la Euroscola-tago certe havis multe da aspektojn kiuj vekis pensojn de partoprenantoj. Por iuj tio estis bona okazo lerni kiel la estonteco de la Eŭropa Unio decidiĝas. Por aliaj la seminario eble estis nur interesa ekskurso eksterlande. Por mi – studanto de ĝenerala lingvistiko en la Universitato de Helsinki – ĝi estis riĉiganta ebleco ekzerci Esperanton kaj la francan, renkonti novajn homojn kaj vidi ke signifa komunikado ne postulas pli ol kelkcent vortojn kaj homojn kiuj volas kompreni kaj kompreniĝi.

*Miikka-Markus Alhonen*

## Esperantotaidolla Ranskaan

Tässä vieressä voit lukea Miikan raportin viime vuoden matkasta Strasbourgiin. Haluatko osallistua vastaavaan matkaan tänä keväänä? Jos sinulla on perustietoa esperantosta ja olet valmis tutustumaan uusiin ihmisiin voit pyytää lisätietoa sähköpostilla *cantskog@kolumbus.fi* Kirjoita mieluiten esperantoksi. Tai soita numeroon 050-5817272.

Matkustamme Helsingistä Frankfurtiin aamulla 30.4. ja katsomme kaupunkia saksalaisten nuorten johdolla. Sitten jatkamme matkaa Strasbourgiin, minne tulee nuorisoa mm. Puolasta, Sloveniasta ja Ukrainasta. Keskustelemme eri asioista ja tutustumme toisiimme ja kaupunkiin.

Tiistaina 3.5. tutustumme EU-parlamenttiin ns. Euroscola-päivänä. Keskiviikkona jatkamme matkaa Pariisin kautta Suomeen.

## Med esperantokunskaper till Frankrike

Vill du delta i en liknande resa som Miikka gjorde i fjol? Om du gått en esperantokurs och är beredd att knyta nya kontakter kan du anmäla ditt intresse per e-post till *cantskog@kolumbus .fi* Skriv helst på esperanto. Vi reser från Helsingfors till Frankfurt på morgonen den 30.4 och börjar med att tillsammans med några tyska ungdomar bese staden. Sedan åker vi buss till Strasbourg, där vi sammanstrålar med polacker, slovener, tjecker, ukrainare och förhoppningsvis även några franska ungdomar. Under två dagar diskuterar vi olika frågor och våra förväntningar på framtiden, lär känna varandra och staden Strasbourg.

Tisdagen den 3 maj ägnas helt åt EU och parlamentets verksamhet under en sk Euroscoladag. Sedan åker vi hem via Paris.

## ✉ Korespondi deziras

Kevin Robb, 35-jarulo el Aŭstralio volas korespondi kun finna esperantisto. Li loĝas en la Or-Marbordo, kiu estas urbego de 500,000 homoj 100 kilometrojn sude de Brisbano. Ĝi estas fama subtropika turista regiono.

Kevin havas fianĉinon Andreya (33-jara), kaj 8-jaran stiffilinon Danielle, de Nov-Zelando. Li laboras kiel telefonisto. Plaĉas al li legi, naĝi, vidi kinofilmojn, kaj vojaĝi. Li lernis Esperanton antaŭ 8 jaroj. Li preferas korespondi e-poŝte, sed ankaŭ volonte korespondos per leteroj kaj aerogramoj.

S-ro Kevin A. Robb, Panorama Palms, 19/8 Ben Lomond Drive, Nerang QLD 4211, Aŭstralio. <*kevrobb@bigpond.com*>

# Kapinallinen ääni soi Helsingin yössä

***Dolchamarin levynjulkistuskeikka veti tuvan täyteen väkeä***

Tammikuisena keskiviikkoiltana helsinkiläisen Semifinal-klubin ovi käy tiuhaan tahtiin. Pääkaupungin rock-mekan, Tavastian, pikkuveli on tarjonnut vuosien saatossa lavansa kirjavalle joukolle erilaisia musiikkiryhmiä ja -tyylejä, mutta tätä siellä ei ole ennen kuultu. On alkamassa Suomen ensimmäisen esperantonkielisen rock-albumin julkistuskeikka.

Levyn nimi on *Rebela Sono* ja sen takana on tuttu, mutta uudistunut Dolchamar.

– Nyt soundiin on otettu enemmän esimerkiksi etnovaikutteita. Mutta kyllä vieläkin pyritään tanssittavuuteen, kuvailee laulaja ja biisintekijä Patrik Austin.

Puoli tuntia ennen keikan alkua hän tekee salin perällä sitä, mitä on tehnyt jo useaan otteeseen lähipäivinä – istuu toimittajan haastateltavana. Tällä kertaa nauhuri tallentaa kysymykset ja vastaukset Studentbladet-lehteä varten.

Kuten viime kesänä festariesiintymisten yhteydessä, Dolchamar on jälleen ylittänyt uutiskynnyksen useassa mediassa. Vierailut nuorten suosiman YleX:n aamushowssa ja Levyraadistakin tutun Njassan ohjelmassa Radio Helsingissä, henkilökuva Patrikista Helsingin Sanomien Tapasimme-palstalla, pidempiä ja lyhyempiä mainintoja uudesta levystä monissa sanoma- ja nettilehdissä. Dolchamarin tiedotusta hoitava Riitta Hämäläinen on jälleen näyttänyt kyntensä.



Semifinaliin on saapunut seitsemisenkymmentä musiikinnälkäistä, kun puoli yhdentoista maissa lavalla alkaa tapahtua.

– Hyvää iltaa! Me olemme Acedia ja toivotamme Dolchamarille oikein paljon onnea, huikkaa laulaja Katja Kilpeläinen mikkiin.

Illan aloittava Acedia on vuonna 2000 perustettu, persoonallista rockia soittava yhtye. Kitaran varresta löytyy esperantisteillekin tuttu mies, Henri “Hippo” Ohvo, joka soitti koskettimia Dolchamarin aiemmassa kokoonpanossa. *Rebela Sono* -levylläkin Hippo on piipahtanut soittamassa mm. mandoliinia. Acedia esiintyy energisesti, ja yleisö saa nauttia mainiosta livemeiningistä ja Katjan upeasta äänestä. Setin loppupuolella osa väestä alkaa jo lämmetä, ja tanssinhytkettä näkyy siellä täällä.

Tauon aikana paikalle saapuu myös Yleisradio. TV1:n Kulttuuriuutiset on lähettänyt toimittajan kuvaamaan menoa. Kun kamera on saatu paikalleen, lavalle nousee illan odotettu päätähti.

– Tänään on tärkeä päivä, hehkuttaa Patrik Austin pilke silmässä, basistillamme Tonilla on nimipäivä!

Jo ensimmäiset kappaleet kertovat, että paitsi yhtyeen nimi, myös tyyli on muuttunut. Viisi vuotta sitten Dolcxamarina julkaistu ensilevy *Lingvo Intermonda* sisälsi jännittä-



vän sekoituksen mm. konemusiikkia, rockia ja räppiä. Rock on edelleen vahvasti mukana, mutta bändin oman määrittelyn mukaan se on saanut seurakseen etno- ja reggaevaikutteita sekä hippusen slaavilaista melankoliaa. Vaikutteet kuuluvat, mutta tanssiminen onnistuu edelleen. Kappaleissa on keveyttä ja ilmavuutta, ja niiden tahdissa on helppoa ja mukavaa hytkyä.

Esperantisteihin uusi Dolchamar tuntuu purevan heti. Jotkut ottavat jo sanoista kiinni, ja lavan edessä tanssitaan antaumuksella. Kieleen vihkiytymätön yleisö tuntuu olevan hieman ymmällään, vaikka Patrik antaakin välispiikeissään osviittaa laulujen sisällöstä.

– Musiikki kuulostaa hyvältä ja tunnelma on mainio. Vähän vain häiritsee, kun ei osaa kieltä. Puuttuu se sisältö, kun ei ymmärrä sanoja, pahoittelee Janne Nevalainen yleisön joukossa.

– Minusta esperanto sopii musiikkiin hyvin. Olin yliopiston esperantokurssilla. Kaikkia sanoja en tietenkään ymmärrä, mutta eihän se näin musiikissa haittaa. Täytyykin ostaa levy, niin voi tutustua teksteihin ja valmistautua samalla jatkokurssiin, pohtii puolestaan Tiina Avomaa.

Illan vaikuttavimpiin kappaleisiin kuuluu Solaj paroj, jossa Hannu Linkolan perkussiot pääsevät täysiin oikeuksiinsa. Kappale alkaa laulun, kitaran ja pehmeän rummun varassa. Patrik laulaa istuen, Hannu on polvillaan rumpunsa ääressä ja Jako Kalliokosken kitara soi kaihoisasti. Vähitellen biisi kasvaa, kun mukaan tulevat Leena Peisan koskettimet, Valtteri Konttisen rummut ja Toni Mäen basso. Kaunista!

Muita illan herkkuja ovat mm. rokimpi versio ensimmäisen levyn Pacmanista sekä hymyjä nostattava ja tanssijalkaa kutittava cover Umberto Tozzin Gloria-biisistä. Setin viimeisenä soi komeasti Himno de EsperHe, Helsingin yliopiston esperantoyhdistykselle tehty kappale.

Yleisö taputtaa Dolchamarin vielä takaisin lavalle ja nauttii loppuun asti.

– Bonan nokton, ni amas vin, hyvästelee Patrik yleisönsä.

Levymyynti käy keikan jälkeen vilkkaana ja lähes parikymmentä uunituoretta levyä vaihtaa omistajaa. Kapinallinen ääni on löytänyt kuulijansa.

*Katja Lampinen*

## Dolchamar keikalla:

**12.2.** klo 19 FEJO-viikonloppu, Kumpulan kylätila, Intiankatu 31, Helsinki (akustinen)
**9.2.** Bary Mary, Porvoo
**22.4.** Liberté, Helsinki
**3.5.** Tavastia, Helsinki
**16.-23.7.** KEF, Helsinki

Keikkakalenteri, laulujen sanat ym. netissä: *www.nettie.fi/dolchamar*

## Hanki oma Rebela Sono!

Fejon Diskejo myy Dolchamarin uutukaista.

Hinta: – käteisellä 17 euroa
– postitse 18,50 euroa

Osta omasi esperantotapahtumien levymyynnistä, Suomen Esperantoliiton toimistolta tai postitse. Katso ohjeet: *http://www.esperanto.fi/fejo/diskejo.htm*

# Popularmuziko de Vittula: Esperanto plenumas sian rolon – ankaŭ en la filmo!

En la libro Populärmusik från Vittula de Mikael Niemi, en finna traduko Populäärimusiikkia Vittulajänkältä, Niila, silenta knabo de la norda forgesita vilaĝo, subite ekparolas en esperanto. La interpretistino de la fora afrika gasto subite malsaniĝas. En la preĝejo neniu scias aliajn lingvojn, sed fine la gasto provas per esperanto. Tiam Niila sin anoncas. Li estas la savanto, same esperanto. Tiu fascina libro vekis ne nur intereson pri la nordaj partoj de Svedio, kiuj nun pro la libro ricevas multajn vizitantojn. Ĝi ankaŭ donis tuŝon de esperanto al siaj multegaj legantoj.

Ĉiu leganto trovas en tiu libro aparte karajn erojn. Evidente la preĝeja sceno estas aparte signifa por la esperantoparolantoj. Kun scivolemo mi iris rigardi la filmon. Ĉu kaj kiel esperanto aperos? Rezultis nenia elreviĝo. Esperanto ludas bele ĉarman rolon. Ni esperantoparolantoj eĉ havas apartajn okazojn ridi. La situacio en kiu



*Necesas interpretado por afrika gasto kaj Niila, 7-jara, je ĉies surprizo, de la preĝeja benko anoncas ke li scias esperanton. La bildo troviĝas inter tiuj ofertataj por gazetara publikiĝo, en Finnlando kun la suba klariga teksto.*

*Jarmo Mäkinen (Isak-isä) ja Tommy Vallikari (Niila, 7 vuotta, ilmoittautuu kirkonmenoissa esperanton kielen tulkiksi) ja Kati Outinen (Päivi-äiti) Reza Bagherin elokuvassa Populäärimusiikkia Vittulajänkältä. Kuva: Mikael Brodin*

Niila lernas esperanton estas pli klara en la filmo ol en la libro. "Kiel vi fartas?" demandas la radio. La saman frazon Niila povas reuzi ankaŭ en la preĝejo.

Al la realigo de la esperantlingvaj partoj kontribuis esperantistoj diversmaniere. Interalie Leif Nordenstorm, redaktoro de La Espero, la organo de Sveda Esperanto-Federacio, rakontas ke li, dum la UK en Gotenburgo, pere de sia poŝtelefono helpis la aktorojn pri la elparolo!

Roland Lindblom en la informilo La Hirundo, novembro 2004, donis pliajn informojn:

"En junio iu telefonis al SEF kaj petis helpon. Ili bezonas virinan voĉon, belan. Mi tuj pensis pri Natalja Gerlach – konata kiel kantistino kun Ĵomart. Oni kontaktis ŝin kaj jam postan tagon ŝi vizitis la filmteamon. En la filmo, kaj en la libro, oni ricevas klarigon kial la knabo Niila povas paroli esperanton. Li sekvis radiokurson, kaj en la filmo ni aŭdas la voĉon de Natalja.

Je la fino de la filmo aperas amaso da nomoj, artistoj kaj helpantoj. Tie ankaŭ aperas nomo de alia esperantistino – Anna-Maria Lange el Lund. Ŝi jam frue havis kontakton kun la verkisto Niemi, kaj poste kun la filmteamo.

Ni esperantistoj povas ĝoji pro la mencio de esperanto kaj ni eble povas atendi ke Mikael Niemi iom lernos la lingvon, almenaŭ iomete, ĉar li aĉetis lernolibron ĉe la esperanta librostando en Bokmässan en Gotenburgo."

La filmo premieris en Pajala la 24an de septembro kaj en Finnlando la 8an de oktobro 2004. En Svedio ĝi allogis pli ol 300 000 personojn al kinejo, en Finnlando 100 000. La filmo estas ankaŭ luebla kaj aĉetebla kiel videofilmo (VHS kaj DVD). La filmo partoprenos en la Berlina filmfestivalo, 10-12 februaro, la konkurskategorion junulara filmo. En la angla ĝi ricevis la nomon Popular Music.

*Anna Ritamäki*

# Lernu.net – opetussivusto, jossa viihtyy!

Esperanto lienee ainoa kieli, jonka pystyy oppimaan omatoimisesti. Näin on tapahtunut kirjojen avulla kaikkialla maailmassa jo yli sadan vuoden ajan. Internetin nopea leviäminen kaikkialle on tuonut myös mahdollisuuden tutustua esperantoon omalla äidinkielellä asuinpaikasta riippumatta ja opetussivustot ovat nykyään erittäin laadukkaita.

Muutama kuukausi sitten hankin itselleni kannettavan mikron ja laajakaistayhteyden. Surffailuni olen aina aloittanut Suomen Esperantoliiton kotisivulta *www.esperanto.fi*. Saatoin kiireettä katsella tarjontaa ja sieltä jostain sitten putkahti esiin *www.lernu.net*. Sinne kun menin niin siellähän sitten viihdyinkin! Palvelu on täysin ilmaista ja palautetta sivustoista on helppo antaa ja se on jopa toivottavaa.

Kun aloitin käyttäjiä oli yhdeksisen tuhatta ja nyt käyttäjien määrä lähentelee kolmeatoistatuhatta. Kiinnostuksen kasvu esperantoa kohtaan lienee nopeinta esperantoliikkeen historiassa. Kaikki sivustoille liittyneet eivät tosin ole kovin aktiivisia, mutta antavat nimensä olla listalla. Heihinkin saa helposti yhteyden parilla klikkauksella. Itse olen sivustojen kautta lähinnä tutustunut uusiin esperantisteihin Alaskaa ja Kiinaa myöten.

Neuvoni esperantosta kiinnostuneelle on hyvin yksinkertainen: Muuta ei tarvita kuin naputella osoitteeksi *www.lernu.net*. Ja kun sivusto avautuu valitsee käyttökielen ja toimii ohjeitten mukaan, siinä kaikki. Loppu on nopeampaa ja yksinkertaisempaa kuin tämän tekstin lukeminen. Kannattaa ehdottomasti kokeilla!

*Markku Saastamoinen*

# Malferma Tago de UEA rekordis

De ses jaroj la Centra Oficejo de UEA ne estis tiel homplena kiel en la 21-a Malferma Tago sabaton, la 27-an de novembro, kiam ĉ. 150 esperantistoj el 18 landoj vizitis la domon en Rotterdam. Tio egalas la rekordon el novembro 1998, sed ĉi-foje la vizitantoj estis pli aĉetemaj ol tiam. La antaŭa vendorekordo estis 4961 eŭroj, sed kvazaŭ por festi la 10-jariĝon de la tradicio de Malfermaj Tagoj la Libroservo de UEA povis registri novan rekordon de 5262 eŭroj.

En mallonga ceremonio prezidanto Renato Corsetti transdonis la Premion ”Onisaburo Deguĉi” al Marjorie Boulton. Tiu ĉi plej grava premio de UEA rekonas longdaŭran agadon por internacia amikeco kaj paco pere de Esperanto. Ĝia ĉi-jara ricevanto estis anoncita en la UK en Pekino, sed la transdono de la Premio okazis en la Malferma Tago. Post la premiado la laŭreatino faris impresan prelegon kun la temo ”Tra Lumo kaj Mallumo: kelkaj memoroj de veteranino”. UEA eldonos ĝin en formo de ilustrita libreto.

Estraranino Claude Nourmont enkondukis omaĝon al Luiza Marin, al kiu Unuiĝo Franca por Esperanto donacis partoprenon en la Malferma Tago por danki ŝin pro preskaŭ 27-jara deĵorado en la oficejo de UFE. Ĝenerala Direktoro Osmo Buller laŭdis la agadon de s-ino Marin kiel modela ĉefdelegito kaj peranto, kaj Atie van Zeist, sekretariino de la CO, transdonis al ŝi rozon por esti simbolo de la dankemo de la Rotterdama stabo pro bona kunlaboro tra la jaroj.

Pluraj novaj originalaj Esperanto-verkoj estis prezentitaj, la plej freŝa la romano ”La kastelo de Vitro” de John Francis, unuafoje aĉetebla en la Malferma Tago. Ĝin prezentis Francisco Veuthey, kiu ilustris la verkon. Jorge Camacho prezentis siajn poemarojn ”Celakantoj” kaj ”Saturno”, kiuj aperis ĉi-jare same kiel la romano ”Dek tagoj de kapitano Postnikov” de Mikaelo Bronŝtejn, kies multtalenta aŭtoro krome plezurigis la publikon per siaj kantoj. Alian muzikan kontribuon al la programo faris la kantgrupo Akordo, kiu prezentis ankaŭ sian kompaktan diskon ”Kristnaska kordo” kun 25 kantoj el diversaj landoj.

Povilas Jegorovas, prezidanto de LKK, raportis pri la preparoj por la 90-a UK en Vilno. La programero ”Estraranoj respondas” donis okazon diskuti kun la kvar ĉeestantaj estraranoj, apud Corsetti kaj Nourmont partoprenis Ulla Luin kaj Ans Bakker-ten Hagen, respektive ĝenerala sekretariino kaj estraranino pri financo kaj administrado. Plia agrabla surprizo estis la ebleco renkonti du membrojn de la Esperanto-redakcio de Pola Radio, Barbara Piertzak kaj Gabriela Kosiarska, kiuj registris dum la Tago plurajn intervjuojn por aŭdigo en proksimaj elsendoj.

Al la nova vendorekordo de la Libroservo precipe kontribuis kelkaj novaj titoloj. La plej furora estis la dudirekta nederlanda vortaro, kiu estis vendita en 29 ekzempleroj, sekvata de la nova romano de Francis (21). Aliaj furoraĵoj estis ”Mil unuaj vortoj en Esperanto” (14), la Postnikov-romano de Bronŝtejn (10) kaj la plej nova titolo en la Serio Oriento-Okcidento, la klasikaĵo ”Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito” de Jaroslav Haŝek (10). Inter diskoj pleje furoris la ĵus aperinta nova KD de Kajto, ”Lokomotivo, rulu nun!” (14).

La vizitantoj povis konatiĝi ankaŭ kun malgranda ekspozicio pri Unesko kaj UEA, kiun Ziko Sikosek kunmetis lige kun la 50-a datreveno de la akcepto de la Montevidea Esperanto-rezolucio de Unesko.

Jam nun la stabo de la Centra Oficejo invitas al la 22-a Malferma Tago sabaton, la 23-an de aprilo 2005.

*(el komuniko de UEA mallongigis mm)*

# Belartaj konkursoj de UEA en 2005

La Belartaj Konkursoj de UEA invitas partoprenantojn por la 56-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 90-a Universala Kongreso en Vilno. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, antaŭe ne publikigitaj. Krome kondiĉoj:

**Poezio:** Maksimuma longo ne fiksita, tri premioj. **Prozo:** Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj, tri premioj. **Teatraĵo:** Maksimuma longo ne fiksita, tri premioj. **Eseo:** Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la UK, ”Universalaj Kongresoj: 100 jaroj da interkultura komunikado”; premio ”Luigi Minnaja” kaj du aliaj premioj. **Kanto:** Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj; la melodion oni povas sendi sonbende aŭ skribe (notoj); premio ”An-Song-san” kaj du aliaj premioj. **Vidbendo:** Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo (vd. ĉe Eseo); daŭro inter 15 kaj 60 minutoj, sistemo VHS/PAL; tri premioj. **Infanlibro de la Jaro:** Originala aŭ tradukita libro (alia ol lernolibro), presforme aperinta en 2004; unu premio.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 2005. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 2005.

Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, p/a Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; rete *<michela.lipari@esperanto.org>*.

La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj, vera nomo kaj adreso en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkursas. Se oni sendas la konkursaĵojn rete, oni indiku la elektitan pseŭdonimon.

Unua premio 220 eŭroj, dua 154 eŭroj, tria 88 eŭroj; Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) 154 eŭroj; Infanlibro de la Jaro 462 eŭroj.

La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkurso. Detala regularo haveblas ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, aŭ rete ĉe *<uea@inter.nl.net>* . Ĝi legeblas ankaŭ en la TTT-ejo *www.uea.org*.

*(el komuniko de UEA mallongigis mm)*

## 36-a IIK apud Vilno

*36-a Internacia Infana Kongreseto (IIK), apud Vilno, 23–30 julio 2005.*

Oni invitas infanojn inter 6- kaj 13-jaraj kun bona rego de Esperanto al neforgesebla semajno. La IIK okazos apud lago en arbaro, 36 kilometrojn nordoriente de la urbo de la Universala Kongreso (UK). Dormlokoj en 5-6 apudaj dometoj, ĉiu dometo havas duŝejojn kaj necesejojn. Estas centra kuirejo kaj manĝsalono kun cent lokoj, kaj kvar komunaj ĉambroj por ludado kaj grupaj programoj.

La ejo nomiĝas litove ”Pailgio perlas” kiu signifas ”Perlo de Pailgis”. La plej proksima urbo estas Pabrade, la IIK-ejo troviĝas en plena naturo kaj estas atingebla el Vilno nur per privata transporto. La kongresetanoj vojaĝos per luita buso el la UK en la komenca sabato (planite je 17.00 h) kaj revenos simile en la ferma sabato (planite ĝis 10.00 h).

IIK havos ekskluzivan uzon de la ripozejo. Apud la loĝejo troveblas infana ludejo, sporta tereno por i.a. korbopilko, retpilko kaj futbalo. Apude estas lago kun observanto por kontroli la sekurecon de naĝantoj. Ĉe la lago eblas uzi boatojn kaj akvo-biciklojn. Estas eksterdomaj tabloj kaj seĝoj, kaj subĉiela rostejo.

Inter planataj programeroj estas man-laboroj, ▷

muzikado, kuk-bakado, paper-faldado, sportaj olimpikoj, trezor-serĉo, kvizoj kaj skeĉumado. Kuiradon prizorgos dungitoj de la ripozejo; eblos atenti vegetaranojn kaj aliajn dietajn bezonojn de infanoj.

La kotizo kovras kostojn de restado, tri manĝojn tage, intermanĝetojn kaj programon de la vespero de la 23-a de julio ĝis la mateno de la 30-a de julio, unu tut-tagan ekskurson kaj alven/foriran transporton. Jen la kotizoj por Finnlando (A-landoj): ĝis 31 marto: 160 eŭroj; ĝis 30 junio: 190; poste 220. Rabato por helpantoj kaj infanoj post la unua el unu familio: 15%.

Petu informilon kaj aliĝilon de la komisiito: Stefan MacGill, Pannonia u. 30 / I / 6, HU-1136 Budapest, Hungario. Tel. (+36 1) 349-5207, *<stefan.macgill@galamb.net>*, *<s_macgill@yahoo.co.nz>*

---

## BET-41 en Riga, Latvio

Dumvoje al UK en Vilnius eblas ĝui tradiciajn Baltiajn Esperanto-Tagojn la 15an ĝis la 21an de julio 2005. Loko: domo de Latva Societo de Rigo, str. Merkela 13, Riga, temo: Baltiaj landoj en Eŭropa Unio.

En programo i.a.: diversnivelaj Esperanto-kursoj, enkonduka kurso en latvan lingvon, Somera Universitato, seminario pri problemoj de Esperanto-movado, Sankta Meso en Esperanto, Interkona kaj Nacia Vespero, Ekskursa Tago, perpiedaj ekskursoj, kvizoj, filmoj, kantoj, dancoj, libroservo, ekspozicioj.

Aliĝkotizo por okcidentaj landoj: ĝis 31 mar 20 EUR, ĝis 31 maj 30 EUR, poste 40 EUR. Infanoj ĝis 15-jaraj ne pagas aliĝkotizon, lernantoj, studentoj, handikapuloj pagas 50% de la kotizo. Loĝado en hoteloj aŭ en studentaj komunloĝejoj (prezo ekde 10 EUR diurne por unu persono).

Aliĝilon kaj plenan informilon petu de la ĉefredaktoro aŭ de la organizantoj retadrese: *etulino@one.lv*

*(mm)*

---

## Aktoj de la Pekina Nitobe-simpozio aperis

Sub la titolo ”Al nova internacia lingva ordo” aperis 239-paĝa volumo kun la aktoj de la 3-a Nitobe-simpozio de Internaciaj Organizaĵoj, kiun UEA organizis en la 89-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino en julio 2004. Ĝi estas redaktita de Lee Chong-Yeong kaj Liu Haitao kaj ĝia enhavo aperas en tri lingvoj: Esperanto, angla kaj ĉina.

La plej ampleksaj kontribuaĵoj en la volumo estas tiuj de Humphrey Tonkin (”Lingva egaleco en internaciaj rilatoj”), Michael Cwik (”Principoj por komunikado ene de multlingva komunumo kiel EU”), Kimiko Schwerin (”La bahaa vidpunkto pri mondaj lingvaj problemoj”) kaj Lee Chong-Yeong (”Al nova internacia lingva ordo”). En la libro troviĝas ankaŭ elstaraj ĉinaj kontribuaĵoj al la problemaro de la simpozio. Ĝenerala direktoro Yang Guang el la ŝtata Lingva Komisiono de Ĉinio, pritraktas la temon ”La celo kaj stato de la homa civilizacio: egaleco kaj diverseco de lingvoj kaj kulturoj” kaj Su Jinzhu el la ĉina Ministerio pri Edukado la temon ”Lingva egaleco sur la fono de lingva diverseco”. Tre interesan studon pri potenciala rolo de Ĉinio por atingi lingvan egalecon en internaciaj rilatoj liveris Liu Haitao, ĉina lingvisto kaj kunredaktoro de la libro.

La libro ”Al nova internacia lingva ordo” kostas 18,00 eŭrojn (plus afranko kaj, en EU, imposto de 6%). Plu haveblas ankaŭ la aktoj de la 1-a Nitobe-simpozio en Prago en 1996, ”Al lingva demokratio”, kies prezo estas 10,20 eŭroj.

*(el komuniko de UEA prenis mm)*

# Oppia ja iloa Valamossa

***Esperanto-kurssi Valamon kansanopistossa 4.-8.7.2005***

Tänä vuonna esperanto-kurssi Valamon ihmeellisessä ilmapiirissä järjestetään jo kuudennen kerran.

## Kokeneet opettajat

Pääopettajana toimii jälleen Atilio Orellana Rojas, joka opettaa niin alkajia kuin jatkajia. Kurssitasoja on osallistujien mukaan tarvittaessa kolme: aloittelijat, jatkajat ja keskustelijat. Suomalaisena opettajana toimii tänäkin vuonna kokenut, kansainvälistäkin mainetta saanut opettajamme Saliko eli Raita Pyhälä ja kurssivastaavana Tiina Oittinen.

Mukaan toivotaan edellisten vuosien tapaan myös ulkomaalaisia: tässä lehdessä on viimevuotisen kurssilaisen, meksikolaisen Osmánin kertomus kurssiviikostaan.

## Monipuolinen ohjelma

Kuten kurssille jo osallistuneet tietävät, Valamo on paljon muutakin kuin vain pelkkää luokassa istumista: oppituntien lisäksi tutustumme ympäristöön ja vietämme yhteisiä iltoja. Viikolla voi tutustua ortodoksisuuteen, kävellä luonnossa tai vaikkapa risteillä viereisellä Juojärvellä. Atilio luennoi jälleen jostain kaikkia kiinnostavasta aiheesta ja ulkomaiset vieraamme esittäytyvät. Yhteinen saunailta aidossa suomalaisessa savusaunassa keskiviikkona tutustuttaa meidät myös jännittävään kämppä Riskiin.

Tule sinäkin joka et vielä ole kokenut Valamon tunnelmaa! Tervetuloa siis niin uudet kuin vanhat Valamon kävijät! – Muuten, kokemuksesta voi sanoa, että Atilion ja Salikon tunneilla voi tapahtua kaikkea mahdollista mukavaa maan ja taivaan väliltä.

**Viiden päivän kurssin hinta on majoituksesta riippuen 185 eurosta 255 euroon.** Hintaan sisältyvät majoitus, opetus sekä viimeisenä iltana juhlaillallinen. Muut ruokailut maksetaan suoraan luostarin kahvila-ravintola Trapesaan, jossa opiskelijoiden aamiainen on hinnaltaan 3,50 euroa, lounas/päivällinen 5,50 euroa ja kahvi/tee 2 euroa. Kurssi alkaa maanantaina klo 9.00 ja päättyy perjantaina klo 11.30.

**Ilmoittautuminen tapahtuu suoraan Valamon kansanopistoon**, osoite: 79850 Uusi-Valamo, puhelin 017-5701400, faksi 017-5701402, sähköposti: *<valamon.kansanopisto@valamo .fi>*. **Mainitse ilmoittautuessasi, osallistutko alkeis- vai jatkokurssille.** Opistolta voit myös tiedustella mm. eläkeläis- ja muita alennuksia. Noin kahta viikkoa ennen kurssia opisto lähettää ilmoittautuneille maksulomakkeen ja lisätietoja.

**Ulkomaalaisia pyydetään ilmoittautumaan Suomen Esperantoliiton kautta.** Kurssi järjestetään yhteistyössä Suomen Esperantoliitto ry:n kanssa, **yhteyshenkilöinä** liiton sihteeri Tiina Oittinen ja ELFIn puheenjohtaja Carola Antskog (osoitteet sivulla 2 tai lehden takasisäsivulla). Heiltä saa lisätietoja kurssista, kurssin päivittäisen ohjelman ja tarvittaessa ulkomaalaisia varten tehdyn ilmoittautumislomakkeen. Tutustu myös EAF:n kotisivuilla olevaan tietoon.



# Lernu kaj ĝuu en Valamo

***Esperanto-kursoj en la Popola Instituto de Valamo 4.-8.7.2005***

Jam la sesan fojon eblas lerni Esperanton en la monaĥeja atmosfero en orienta Finnlando. Vin atendas komence de julio belega naturo, bonhumoraj kaj bonkoraj homoj kaj travivaĵoj pere de Esperanto. Venu ankaŭ vi kiu ne ankoraŭ spertis la miraklan etoson. Kaj same bonvenaj estas kompreneble vi, kiuj jam iam partoprenis la aranĝon.

### Kursoniveloj

Ĉiutage estos instruado ĉirkaŭ 5 horojn: Tiuj, kiuj ne ankoraŭ konas la lingvon komencas de la unuaj aferoj. Aliaj profundigos sian lingvoscion pere de la daŭriga kurso dum kiu spertuloj povas helpi la novulojn. Vi kiuj jam scipovas la lingvon diskutos, aktoros, legos artikolojn kaj resumos ilin, aŭskultos/faros prelegetojn ktp. Je via dispono estos du spertaj instruistoj kaj la kursogvidanto.

### Varia programo

Posttagmeze kaj vespere estos ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo. Vespere estos komuna programo kun prelegetoj, kunkantado, kunludado, muzikado, saŭnumado en vera fumsaŭno ĉe lago, manĝado. Ĉio tio en trankvila etoso de la monaĥejo: laŭvole eblos al vi viziti ortodoksan diservon en belegaj preĝejoj.

**La kursosemajno**: 4.-8.7.2005. La kurso komenciĝas lunde la 4-an de julio, sed eblas alveni jam dimanĉe vespere. **La loko**: Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, orienta Finnlando

**Instruistoj**: Atilio Orellana Rojas el Nederlando/Argentino kaj Raita Pyhälä el Finnlando. Kursogvidanto: Tiina Oittinen

Se vi volas vidi kia la loko estas, iru al *www.valamo.fi*. Notu, ke en la Popola Instituto de Valamo la personaro nek parolas esperanton nek respondas al esperantlingvaj retpoŝtoj. Finnoj aliĝas rekte al la instituto (vidu la finnlingvan tekston). **Eksterlandanoj bonvolu kontakti pere de EAF.**

Kotizoj por la kursosemajno inter 185–255 eŭroj (sen manĝoj) depende de tranoktado. La ĉambroj sen propra banejo havas komunajn necesejon kaj duŝon en la koridoro. La kursokotizo inkluzivas festan vespermanĝon en la lasta vespero. Aliaj manĝoj estas aĉeteblaj ĉiutage en la loka restoracio (prezoj 5,50 e/tagmanĝo, 3,50 e/matenmanĝo, 2 e/kafo aŭ teo). La ŝipkrozadon mardon 5.7. kaj la saŭnan vesperon merkredon 6.7 eblas partopreni (aparta pago).

**Pliajn informojn** de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF).

Kontaktulo: Tiina Oittinen, sekretario de EAF, adreso: Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, Finnlando, tel: 02-2305319, *eafsekretario@esperanto.fi*

Pliaj informoj ankaŭ de Carola Antskog, sekciestro de ILEI en Finnlando, adreso: Brokärrvägen 89, 25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*

# Valamo, Finnlando

Partoprenante la E-kurson en Valamo, mi alproksimiĝis al Esperanto kaj al la mirinda finna kulturo. Dum mia restado tie mi povis percepti la zorgon kaj respekton, kiujn finnoj havas por la arbaro, lagoj kaj la naturo ĝenerale. Tio estas io admirinda, ĉar ĝi montras la valorojn de tiu kulturo kaj civilizo.

Dum la kurso, kies ĉeestantoj estis plejparte finnoj, mi lernis pri iliaj kutimoj, historio kaj eĉ kelkajn vortojn en la finna lingvo.

Mirindaj pejzaĝoj ĉie estis. Arbaroj ĉirkaŭitaj de lagoj aŭ lagoj ĉirkaŭitaj de arbaro daŭre kaptis mian atenton. Vizito al la monaĥejo, la arbaro kaj la neforgesebla sperto pri saŭnado estas

daŭre en mia memoro dank'al la ĉiam riĉaj informoj flanke de finnaj Esperantistoj, kiuj ĉiam rakontis pri la vivo tie.

Mi ŝatis la lecionojn, ankaŭ pro tio ke mi dekomence provis komuniki kun la aliaj lernantoj en Esperanto mem, ĉar ni ne havis alian komunan lingvon. Mi estas danka al mia instruistino Saliko, kiu entuziasme kaj energie instruis. Mi multe ĝuis la ĉeeston de la aliaj en la grupo: Ulla, Aura, Seija, Airi ja Miamaria.

Kion mi ŝatus aldoni, estas, ke mi esperas, ke oni pli diskonigu la ekziston de ĉi tiuj kursoj, tiel ke homoj kiel mi, kiuj loĝas for de Eŭropo, povas konatiĝi kaj kun Esperanto kaj ankaŭ kun la finna kulturo.

*Osman Lucero Anzures (Meksiko)*

---

Osallistumalla Valamon esperantokurssille tutustuin esperantoon ja myös ihmeelliseen suomalaiseen kulttuuriin. Vierailuni aikana saatoin havaita sen huolenpidon ja kunnioituksen, joka suomalaisilla on metsää, järviä ja yleensä luontoa kohtaan. Tämä on ihailtavaa, sillä se tuo esiin tämän kulttuurin ja sivistyksen arvoja.

Kurssin aikana – sen muut osallistujat olivat suomalaisia – sain lisää tietoa suomalaisten tavoista ja historiasta ja opin jopa muutamia suomenkielisiä sanoja.

Joka puolella oli ihmeellisiä maisemia. Metsät, joita ympäröivät järvet tai järvet, joita ympäröivät metsät, saivat minut koko ajan innostumaan. Vierailu luostarissa, metsä ja unohtumaton saunakokemus ovat aina mielessäni, ja aivan erityisesti siksi, että suomalaiset esperantistit kertoivat kaikissa tilanteissa monipuolisesti elämisestä Suomessa.

Pidin kovasti oppitunneista ja myös siitä, että alusta alkaen saatoin kokeilla kommunikointia esperantoksi, koska meillä ei ollut muuta yhteistä kieltä. Olen kiitollinen opettajalleni Salikolle (Raita Pyhälä), joka opetti innostuneesti ja energisesti. Pidin kovasti myös yhdessäolosta ryhmäni kanssa, johon kuuluivat Ulla, Aura, Seija, Airi ja Miamaria.

Haluaisin vielä lisätä, että toivon laajempaa tiedottamista näistä kursseista, jotta minunkaltaiseni Euroopan ulkopuolella asuvat henkilöt voisivat tutustua sekä esperantoon että suomalaiseen kulttuuriin.

*Osman Lucero Anzures (Meksiko)*



***Osman Lucero Anzures (dekstre) kaj Atilio Orellana Rojas lastsomere en Finnlando.***

# Vintraj Tagoj de EAF en Orivesi

## *Instruado kaj Esperantoeventoj*

**Suomen Esperantoliiton Talvipäivät Orivedellä**
Opetusta ja esperantotapahtumia

**Finlands Esperantoförbunds Vinterdagar i Orivesi**
Undervisning och esperantoevenemang

**12.-13.3.2005**
Orivesi-instituto – Oriveden Opisto, Koulutie 5 35300 Orivesi

La ĉi-fojaj Vintraj Tagoj enhavos variajn aferojn. Ni konatiĝos al la mondo de instruado kaj rememoros pri pasintaj kaj informiĝos pri venontsomeraj Esperantoeventoj. Ni speciale rememoros la grandan aranĝon de la jaro 1995, la Universalan Kongreson en Tampereo.

La fama Orivesi-instituto, kies distancinstituto ankaŭ ofertas Esperantokurson, prezentos sin kaj la urbo Orivesi regalos nin per kafo.

Ni inspiriĝos pri novaj instrumetodoj helpe de Patrik Austin, kiu ne nur estas ano de la bando Dolchamar kaj FEJO-prezidanto sed ankaŭ aktiva kaj novpensa lingvoinstruisto. Ritmo, movado, koloroj kaj ludoj estas utiligeblaj rimedoj en lingvolernado. Patrik Austin prezentos instruspektaklon kun praktikaj ekzemploj. Krome vi havos ŝancon ricevi gvidatan konatiĝon kun lingvolernado en la interreto, ĉefe pere de la multlingva Esperantoretejo *Lernu.net*. Prelegos ankaŭ Jukka Pietiläinen, komisiito de Universala Esperanto-Asocio pri informado kaj verkanto de aperonta libro pri Esperanto en la finna.

Dum la sabatvespero ni okazigos bazaron kun diversaj programeroj. Ni rememoros pasintajn eventojn – vi estas bonvena kunporti fotojn kaj rememoraĵojn. Ni konatiĝos kun estontaj eventoj, interalie kun la Kultura Esperanto-Festivalo, kiu okazos julie en Helsinko.

Kiel ĉiam dum Vintraj Tagoj ankaŭ nun estos decidita la estonteco de nia asocio: en la dimanĉa jarkunveno ni, la membraro, faros ĉiujn gravajn decidojn.

Ĉi-foje ni vizitos du urbojn dum la semajnfino: unue la urbeton Orivesi kaj due la trie grandan urbon de nia lando, Tampereo. Post la jarkunveno kaj lunĉo la loka esperantosocieto Antaŭen montros al ni dum aŭtobusa rondveturado la famajn lokojn de UK 1995 kaj invitos nin fine kafumi en sia oficejo, la malgranda sed hejmeca Nesto.

Venu ankaŭ vi! Aliĝu tuj!

### Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Sendu la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinki aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson *eafmendoj@esperanto.fi*. Aliĝilo troviĝas ankaŭ en *www.esperanto.fi*. Krome pagu la kotizon al la konto de EAF. Uzu referencnumeron! Notu, ke estas tre grave kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke la organizantoj sciu, kion vi mendas kaj ĉu vi bezonos ekzemple transporton (pri transporto vidu sub programo).

Kun eventualaj demandoj pri la traknoktoj, manĝoj kaj transportoj same kiel pri vojaĝebl-ecoj vi povas turni vin al la EAF-sekretario Tiina Oittinen aŭ al la lokaj kontakpersonoj Markku Saastamoinen kaj Sylvia Hämäläinen. Pri programaj aranĝoj respondecas ankaŭ EAF-prezidanto Anna Ritamäki. Pri la aliĝiloj prizorgas kiel kutime Päivi Saarinen en kunlaboro kun la EAF-kasisto. Kontaktinformojn por aliaj troviĝas en la pago 2, por Sylvia ili estas: Teivaalantie 85, 33400 Tampere, *sylvia.h@kolumbus.fi*, 03-3463493.

★

Tämänkertaisten Talvipäivien ohjelma on monipuolinen. Lauantaina on aluksi ohjelmassa Oriveden opiston ja kaupungin esittely, minkä jälkeen nautimme kaupungin tarjoamat kahvit. Etäopistolla on myös tarjonnassaan esperantokurssi.

Patrik Austin on esperantomaailmassa tunnettu Dolchamar-yhtyeen keulahahmona ja Suomen Nuorten Esperantoliiton puheenjohtajana. Tämän lisäksi hän on taitava ja innovatiivinen kieltenopettaja. Tutustumme Patrik Austinin esityksen avulla uusimpiin virtauksiin: rytmi, liikkuminen, värit ja pelit ovat hyödyllisiä apuvälineitä kieltenopiskeluun. Talvipäivien aikana saamme myös käyttöömme tietokoneita joiden avulla tutkimme verkkomaailmassa olevaa esperantotietoa. Pääset mm. opastetulle kierrokselle *Lernu.net*-sivustoon, joka tarjoaa monitasoista esperantonopetusta.

Luonnoitsijana on myös Jukka Pietiläinen, joka on mukana kehittämässä Esperanton maailmanliiton tiedotustoimintaa. Pietiläinen suunnittelee esperantosta kertovaa teosta suomen kielellä.

Iltaohjelma kokoaa päivän annin yhteen ja kertoo basaari-tyyppisesti v. 1995 Tampereen kongressista sekä ensi kesän monista esperantotapahtumista niin Suomessa kuin ulkomailla, mm. Esperantofestareista, jotka järjestetään heinäkuussa Helsingissä.

Sunnuntaina on taas tärkeiden hetkien aika: liiton korkein päättävä elin on sen vuosikokous, jossa tarkastellaan kulunutta toimintakautta ja sovitaan yhdessä seuraavan suuntaviivoista.

Päivien lopuksi lähdemme yhteisellä bussilla Orivedeltä Tampereelle, jossa kiertoajelulla näemme v. 1995 kongressin tärkeät tapahtumapaikat. Esperantoseura Antaŭenin jäsenet toimivat isäntinämme ja kutsuvat meidän lopuksi kahville pieneen, mutta toimivaan Nesto-kokoustilaansa.

Tule mukaan ja ilmoittaudu heti!

**ALIĜILO**

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF en Orivesi 12.-13.3.2004.

Nomo

______________________________

Adreso

______________________________

Tel./Fakso/Retadreso

______________________________

**Aliĝkotizo:**

❑ 16 e ĝis 25.2.2005 ______

❑ 20 e ekde 25.2.2005 ______

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo kaj personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

**La kunvena paketo** 12.-13.3. (tranokto, manĝoj laŭ la programo)

❑ 58 e dulita ĉambro ______

❑ 70 e unulita ĉambro ______

❑ 30 e nur manĝopaketo ______
(manĝoj laŭ la programo sen matenmanĝo)

Pri amasloĝejo kaj prezoj por infanoj, bv. kontakti la aranĝantojn.

❑ **Mi venos** je _______ per ❑ trajno / ❑ buso kaj bezonas transporton al la instituto.

**Entute** pagenda al la konto de EAF ______

Pagoj al la konto: Sampo **800017-230825**. Bv. uzi la Vintraj tagoj referencnumeron **4640**.

Pliaj informoj aŭ deziroj:

______________________________

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki
aŭ la informoj rete al: eafmendoj@esperanto.fi

**ILMOITTAUTUMISLOMAKE**
Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Talvipäiville Orivedelle 12.-13.3.2004.

Nimi

---

Osoite

---

Puh./fax/sähköposti

---

**Osallistumismaksu:**

❑ 16 e 25.2.2005 saakka ______

❑ 20 e 25.2.2005 jälkeen ______

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Alle 15-vuotiaat lapset ilman osallistumismaksua ja Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

**Kokouspaketti** 12.-13.3. (majoitus, ohjelmaan merkityt ruokailut)

❑ 58 e 2 hengen huone ______

❑ 70 e 1 hengen huone ______

❑ 30 e vain ruokapaketti ______
(ohjelman ruokailut ilman aamiaista)

Kokouspaketista lapsille ja yhteismajoituksesta lisätietoja järjestäjiltä.

❑ **Saavun** klo ______ ❑ junalla/ ❑ bussilla ja tarvitsen kuljetuksen opistolle.

**Yhteensä** maksettava EAF:n tilille ______

Maksut EAF:n tilille: Sampo **800017-230825** käyttäen Talvipäivien viitenumeroa **4640**.

Lisätietoja tai toivomuksia:

---

Lähetä ilmoittautumislomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto ry
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki
tai tiedot s-postitse: eafmendoj@esperanto.fi

**Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt**

Lähetä ilmoittautumislomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai lähetä vastaavat tiedot sähköpostilla osoitteeseen *eafmendoj@esperanto.fi*. Lomake on myös liiton veppisivuilla *www.esperanto.fi*. Maksa osallistumis- ja pakettimaksut ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille. Käytä viitenumeroa! Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvitsemme myös ilmoittautumistiedot, jotta tiedämme mitä olet tilannut ja milloin tulet.

Majoitusta, ruokailua sekä matkustusvaihtoehtoja koskevia asioita voit tiedustella liiton sihteeriltä Tiina Oittiselta sekä paikallisilta yhteyshenkilöiltä Markku Saastamoiselta ja Sylvia Hämäläiseltä. Ohjelma-asioissa yhteyshenkilönä on myös liiton puheenjohtaja Anna Ritamäki. Ilmoittautumislomakkeista ja maksuista huolehtii tuttuun tapaan Päivi Saarinen yhteistyössä liiton rahastonhoitajan kanssa. Sylvian yhteystiedot: Teivaalantie 85, 33400 Tampere, *sylvia.h@kolumbus.fi*, 03-3463493. Muiden tiedot sivulla 2.

## Vintraj Tagoj en Orivesi Programo – ohjelma

Orivesi-instituto – Oriveden Opisto
Koulutie 5 35300 Orivesi

### Sabaton la 12an de marto
### Lauantai, 12.3.2005

Transportoj al Orivesi-instituto estos aranĝitaj el la fervoja stacidomo de Orivesi por trajnoj je 11.30 kaj 12.30 kaj same de la aŭtobusa stacidomo de Orivesi laŭbezone. Informu al la organizantoj, se vi deziras transporton (vidu la aliĝilon).

Kuljetus Opistolle Oriveden rautatieasemalta järjestetään saapuville junille klo 11.30 (Treelta 11.30, Jämsästä klo 11.27) ja klo 12.30 (Treelta), samoin kuljetus järjestetään tarvittaessa Oriveden linja-autoasemalta samoihin aikoihin.

Kerro kuljetustoiveesi järjestäjille ilmoittautuessasi.

**12.30** Malfermo de akceptejo. Vastaanotto avataan.
**12.30** Lunĉo. Lounas.
**13.30** Bonvenigaj vortoj. Tervetulosanat.
**13.45** Prezentado de Orivesi-instituto kaj de distancinstituto kun esperantokurso. Urbo Orivesi sin prezentas. Oriveden Opiston, KSV:n etäopiston ja esperantokurssin esittely. Oriveden kaupungin puheenvuoro.
**14.45** Kafo (de Orivesi-urbo). Kahvi (tarjoaa Oriveden kaupunki).
**15.15** Patrik Austin: Ritmo, movado, koloroj kaj ludoj – la novaj rimedoj de lingvo-instruado. Patrik Austin kieltenopetuksen uusista menetelmistä.
**16.15** Prelego de Jukka Pietiläinen. Jukka Pietiläisen luento.
**17.00** Kunvenoj de ELFI, KELF, ktp. Kokouksia: ELFI, KELF ym.
**18.45** Akcepto Nino Runeberg. Vastaanotto N.R:n seuran jäsenille.
**19.00** Vespermanĝeto. Iltapala.
**20.00** Vespera programo (bazaro) enhavos rememerojn pri UK1995, KEF2000 kaj informoj pri someraj eventoj: KEF2005, Valamo-kurso, karavano al Vilno ktp. Muziko kaj komuna kantado. Iltaohjelmaan (basaari) kuuluu muistoja Tampereen kongressista 1995, vuoden 2000 Esperantofestareista (KEF), mutta myös tietoja kesän esperantotapahtumista: KEF2005, Valamon kurssi, Vilnan karavaani jne. Musiikkia ja yhteislaulua.

### Dimanĉon la 13an de marto<br>Sunnuntai, 13.3.2005

**8.00** Matenmanĝo. Aamiainen.
**9.00** Matenpreĝo de KELF. Aamuhartaus, järj. KELF.
**9.45** Kontrolo de rajtigiloj. Valtakirjojen tarkastus.
**10.00** Jarkunveno de EAF. Vuosikokous.
**12.30** Lunĉo. Lounas.
**13.15** Ekveturo per komuna buso al Tampere, kie rondveturado en lokoj de UK de 1995. Adiaŭa kafo en Nesto (aranĝos anoj de Antaŭen). Lähtö yhteisellä bussilla Tampereelle, jossa kiertoajelu v. 1995 kongressin tapahtumapaikoilla. Päätöskahvit Nestossa (järj. Antaŭenin jäsenet), Satakunnankatu 30 C 6, Tampere.
**16.30** Aŭtobusa transporto al stacidomoj. Bussikuljetus rautatie- ja linja-autoasemille (trajnoj/junia je 17.00 (Hki kaj Seinäjoki/ Oulu), 17.05 (J:kylä), 18.11 (Tku).

Notu, ke la foriro okazos por ĉiuj tra Tampereo. Se tiu horaro ne eblas por vi, bonvolu informi la organizantojn. Same informu, se vi uzas propran aŭton por veturo al Tampereo.

Huomaa, että päivien ohjelman loppuosa järjestetään Tampereella. Jos jostain syystä et osallistu yhteiseen bussikuljetukseen tai yhteiseen ohjelmaan Tampereella, ilmoita siitä järjestäjille. Kerro myös, mikäli tulet Tampereelle omalla autolla.

Ŝanĝoj en la programo eblas – muutokset ohjelmaan mahdollisia.

*Bonvenon – Tervetuloa!*

## ELFI

## Alvoko al jarkunsido

Jarkunsido de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj ELFI okazos sabate la 12an de marto 2005 je la 17h en Oriveden Opisto. Estas traktotaj la laŭstatutaj aferoj kaj la nova statuto.

*Estraro*

## Kokouskutsu

Suomen opettajain esperantoliitto ry:n vuosikokous pidetään lauantaina 12. maaliskuuta 2005 klo 17 Oriveden Opistolla. Käsitellään sääntömääräiset asiat sekä uudet säännöt.

*Johtokunta*

# Kultura Esperanto-Festivalo 2005

**en Helsinko, Finnlando 16-23.7.2005**

***"Korpo kaj kulturo"***

## Ĉu jam?

◆ Ĉu jam vi spertis prezenton de Fraŭlino Barlaston aŭ konatiĝis kun esperanta literaturo?

◆ Ĉu jam vi aŭdis la plej famajn bandojn de Esperantujo? Ĉu jam Dolchamar akustike?



◆ Ĉu jam vi ĉeestis preskaŭ tutvesperan, pli ol okazoplenan oper-vesperon de operkantistino **Liisa Viinanen**?

◆ Ĉu iam vi revis pri kantado de "Sola" aŭ "Amanda" aŭ "Ĉu vi pretas?" kun la efektiva bando mem aŭ pri esperanta versio de Titanic aŭ James Bond-filmoj?

◆ Ĉu vi scias, kion pensas esperantaj viraŭtoroj pri virinoj kaj inverse, kion virinoj opinias pri viroj?

Egale, ĉu vi respondas jese aŭ nee – indas partopreni la plejplejan, internacian esperantokulturan festivalon KEF2005 en somera Helsinko. Pliaj programaj informoj baldaŭ legeblas en www.esperanto.fi/kef2005 kaj la aliĝilon vi trovas en la numero 6/2004 de Esperantolehti. La festivalon organizas kunlabore FEJO kaj Esperanto Klubo de Helsinko.

## Artistoj



- **Fraŭlino Barlaston**
- Jorge Camacho
- Liisa Viinanen
- Kim Henriksen
- Arnau Torras
- Martin Wiese
- Duplustro
- Ĵomart, Nataŝa kaj Karina
- Esperanto Desperado
- JoMo kaj la Liberacanoj
- Dolchamar

## Disaj programeroj

### *Atelieroj*

- Poema ateliero
- Popateliero: poppecoj kaj kantotekstoj
- Voĉouza ateliero: Kiel uzi sian korpon kaj pli utiligi sian plenan voĉoprovizon
- Humura filmoateliero: famaj filmoscenoj aktore kaj duble

### *Korpkulturaj ekzercoj*

- Matena aerobiko laŭ espomuziko
- Ludotago

### *Prelegoj kaj prezentoj*

- Beletraj amaferoj: Viroj pri virinoj, virinoj pri viroj
- Poezie: ABC de amo: amoj, mamoj, amoroj kaj mamzonoj – erotika poezio en esperanto



Katja Lampinen, radioredaktoro kaj juna fejoanino, gvidos nin al korpolingvo kaj kulturaj diferencoj kaj al filmodublado.

- Aŭtoraj horoj
- Korpolingvo kaj kulturaj diferencoj
- Ribele, rebele: Esperanta rokliriko
- Granda konkurso pri filmodublado
- Ŝamana vespero: ŝamandrumoj kaj kalevalaaj poemoj
- Preskaŭ tutvespera esperanta opero
- Esperanta karaokeo kun vivbando
- Komiksekzpozicio
- Dolchamar eĉ akustike
- Filmoj
- Esperanta disko

Kaj multo pli... Ne maltrafu!

Pliaj informoj:
www.esperanto.fi/kef2005 aŭ
hamalainen.riitta@kolumbus.fi aŭ
patrik.austin@helsinki.fi


Esperanto Desperado

## Kiu estis aktiva aganto en 2004?

La estraro de EAF nomumis ĉiujare ekde 2001 aganton de la pasinta jaro. Por 2000 Riitta Hämäläinen, por 2001 Aini Vääräniemi, por 2002 Tapio Sormunen kaj por 2003 Raita Pyhälä (Saliko).

Kiu laŭ vi meritus la titolon Aganto de la jaro 2004? Bv. kontakti iun de la estraranoj kun via propono antaŭ la sekva estrarkunsido (la 19an de februaro en la oficejo). Neoficiala kontakto sufiĉas, sed kompreneble bonaj motivoj helpos nin fari la ĝustan decidon.

*(amr)*

## Esperanto-societo en Turku, novaĵoj

La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-societo en Turku okazos la 6-an de februaro 2005. La societo aranĝos kongreslandan kunvenon la 6an de marto je 14a en la kutima Blua Salono de la Malnova Urbodomo. Ĉiumerkrede je 16.30 kolektiĝos Diskutrondo en la kafejo de ĉiovendejo Stockmann kaj ŝanĝas opiniojn kaj spertojn de libro pri la kongreslando Litovo. Krome dum la kafeja renkontiĝo estas informitaj landaj kaj mondaj esperantaj novaĵoj. Vizitantoj estas bonvenaj. Esperantokursoj en Aurala Civitana instituto daŭros ĉiun mardon posttagmeze. Ankaŭ la kurson eblas viziti. Kontaktu kun la estraranoj por pliaj informoj.

Turun Esperanto-yhdistyksen tilaisuuksiin ovat tervetulleita kaikki esperantosta kiinnostuneet. Säännölliset tapaamiset: tiist. klo 15.30-17.00 Auralan kansalaisopiston esperanton alkeis- ja jatkokurssi, ke klo 16.30-17.30 Stockmannin keskustelupiiri. Seuraava yhdistystapaaminen, jossa tutustutaan ensi kesän esperantotapahtumiin, mm. maailmankongressiin Vilnassa, on 6.3.2005 klo 14.00 Vanhalla Raatihuoneella. Lisätietoja pj. Tiina Oittinen, 02-2305319 tai siht. Leena Tiusanen, 02-2320542.

*EST-estraro*

# EAF kaj UEA serĉas novan ĉefdelegiton

Venis la tempo trovi novan ĉedelegiton de UEA en Finnlando. Heta Kesälä post longa kaj fidela plenumo de la tasko nun forlasos la postenon. Ŝi tamen pretas plenigi ĝin ankoraŭ kelkajn monatojn ĝis la sekvanto estos trovita. La estraro de UEA laŭ la propono de EAF elektos la novan ĉefdelegiton.

Laŭ la regularo de deligitoj de UEA la delegitoj havas trijaran mandaton, ankaŭ la ĉefdelegito. La ofico de ĉefdelegito estas inter la plej prestiĝaj taskoj en la esperantomovado. Ĝi estas ankaŭ sufiĉe laboriga tasko. En Finnlando la ĉefdelegito tradicie estas ankaŭ kotizperanto de UEA. Tiuj du funkcioj tamen estas formale apartaj. La ĉefdelegito gvidas la delegitan reton en sia lando. La delegito peras al UEA kotizojn por membreco kaj por partoprenoj en universala kongreso, abonpagojn kaj kutime ankaŭ transpagojn al la personaj UEA-kontoj. (Ĉiu individua UEA-ano, inkluzive de TEJO-anoj, havas kodon, kiu aŭtomate ankaŭ estas kontokodo.)

Jarlibro 2004 registris 1783 delegitojn el kiuj 49 el Finnlando. Por fariĝi delegito necesas esti individua membro minimume unu jaron antaŭ la delegitiĝo kaj daŭre resti tia por konservi la oficon. Eblas esti loka delegito (D), loka vicdelegito (VD), junulara delegito (JD) aŭ fakdelegito (FD). En sama loko povas esti nur po unu D, VD kaj FD. La nombro de fakdelegitoj ne estas limigita, sed sama delegito ne povas havi pli ol tri fakojn.

Vi povas daŭre pagi viajn kotizojn al la ĉefdelegita konto de Heta Kesälä ĝis ni anoncos novan aranĝon.

*Anna Ritamäki*

Mi volas lasi la ĉefdelegitan taskon pro mia nebona sanstato. UEA-estraro kaj EAF-estraro decidos la novan ĉefdelegiton.

Antaŭ preskaŭ 14 jaroj mi ekagadis kiel ĉefdelegito. Mi dankas al finnlandanaj esperantistoj pro bona kunlaboro.

*Kun bondeziroj, sincere*
*Heta Kesälä*

## Tampereen toimintaa – Agado en Tampere

**Päivystys** Nestossa, Satakunnankatu 30 C 6, joka maanantai kello 16–17. **Deĵoro** en klubejo Nesto ĉiun lundon je 16–17.

**Kerhoillat** Nestossa maanantaisin klo 17 alkaen / **Klubvesperoj** en Nesto lunde ekde la 17-a horo:

7.2. Jukka Laaksonen näyttää dioja käymistään kongresseista – Jukka Laaksonen montras dia-bildojn pri liaj kongresvojaĝoj.

21.2. Vuosikokous – Jarkunveno.

21.3. Jorma Ahomäki Turusta kertoo vierailustaan Vilnassa – Jorma Ahomäki el Turku rakontas pri lia vizito en Vilnius.

Lauantaina – Sabate 21.5. Kevätretki (alustavan ajatuksen mukaan Pohjanmaalle) – Printempa ekskurso (laŭ provizora ideo norden al Pohjanmaa).

Alkaen – Ekde 23.5. kesätapaamiset pääkirjasto Metson kahvilassa – someraj renkontiĝoj en ĉefa biblioteko Metso.

### Kurssit

ETY-eläkeläisten Esperantokerho jatkaa talvella joka toinen torstai 13.1. alkaen Nestossa klo 11.30–13.00, ohjaajana Pentti Järvinen.

Esperantokurssi alkajille, jos vähintään kolme halukasta löytyy, tarvittaessa Nestossa keskiviikkoisin kello 18–19, opettajana Sylvia Hämäläinen, puh. (03) 3463 493.

*(el Vekilo kompilis mm)*

## Aliĝu kiel individua membro de UEA-TEJO!

Ĉu vi jam estas individua membro (IM) de UEA, kaj se sub 30-jara ankaŭ de TEJO? Universala Esperanto-Asocio kaj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo estas la tegmentaj asocioj de EAF kaj FEJO. Kiel IM vi ricevas la jarlibron de UEA kaj depende de kategorio ankaŭ aliajn eldonaĵojn. Vi ankaŭ ricevas rabatojn partoprenante la kongresojn.Jen la plej gravaj kotizkategorioj:

Membro kun Jarlibro (MJ) 22 eŭroj
Membro-Abonanto (MA) 55 eŭroj

Anoncu ankaŭ vian naskiĝdaton. MJ kaj MA rajtigas membrojn naskitajn post 1.1.1975 al ricevo de la revuoj TEJO Tutmonde kaj Kontakto. La samajn revuojn ricevas patronoj de TEJO. La patrona kotizo estas 66 eŭroj.

Informojn pri pliaj kotizkategorioj kaj pri la agado de UEA kaj TEJO troveblas rete ĉe *www.uea.org* kaj *www.tejo.org*.

La konto por pagi la kotizojn en Finnlando estas ĉe Sampo 800029-19438647.

*Anna Ritamäki*

## Novaĵoj el Jyväskylä

**Nova estraro – uuden hallituksen kokoonpano ja tehtävät.** Syyskokous 24.11.2004 valitsi hallituksen: puheenjohtaja Seija Kettunen, varapuheenjohtaja Pentti Makkonen, sihteeri Kari Kettunen, taloudenhoitaja Aimo Nikander, jäsenet Risto Jämsen, Aune Makkonen, Norma Perälä, Terttu Tyynelä, Heikki Veijanen.

**Opintokerho Esperanton alkeita** aloitti seitsemän opinhaluisen henkilön voimin ke 5.1. Suurin osa jäsenistä osallistui syksyllä Raita Pyhälän vetämälle viikonloppukurssille. Tarkoitus on kevään aikana kokoontua Sepänkeskuksessa joka viikko tai joka toinen viikko yhteisesti valittujen teemojen merkeissä. Alussa sovittuja teemoja ovat mm. Vintro, Miaj hobioj, Laboro/studado, Gastronomio/restoracio, Turismo/vojaĝado ktp. Jos haluat tulla mukaan kertaamaan tietojasi, saat lisätietoja Seijalta tai Karilta.

Syksyllä alkanut **opintokerho Esperanto tra la mondo** jatkaa seuraavasti:

ke 2.2. Esperantogastoj en Jyväskylä tra jardekoj

ke 16.2. Memorindaj esperantokongresoj (Helsinki, Belgrad, Antwerpen k.a.)

ke 16.3. Rememoroj pri la esperantokongreso de Tampereo 1995

ke 13.4. Mia hobio

Kerho kokoontuu Sepänkeskuksen Happi-kerhohuoneessa em. päivinä klo 16.30 alkaen. Kaikki kiinnostuneet ovat tervetulleita osallistumaan tai kuuntelemaan.

**Kevätkokous** keskiviikkona 30.3. Sepänkeskuksen Happi-kerhotilassa klo 16.30. Käsitellään toimintakertomus ja tilinpäätös vuodelta 2003 sekä päätetään kevään ja kesän toiminnasta.

*informis Seija Kettunen*

## Eventokalendaro de EAF 2005

**12-13.3.05** Vintraj Tagoj en Orivesi
**30.4-4.5.05** Eŭropa Amikeco-seminario kun Euroscola (ELFI)
**4-8.7.05** Kursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)
**16-23.7.05** Kultura Esperanto-Festivalo en Helsinko (FEJO)
**23-30.7.05** U. Kongreso en Vilno, Litovio (UEA), karavano planata de Finnlando
**31.7.-7.8.05** Internacia Junulara Kongreso en Zakopane, Pollando (TEJO)
**septembro 2005** Aŭtunaj Tagoj kiel ekskurso al Esperantodomo en Lesjöfors, Svedio

### Datoj de EAF-laborkunvenoj

**19.02.05** EAF-estraro
**13.03.05** EAF-jarkunveno

# Muut lehdet Esperantosta

### Kielivalinta tuo palstatilaa

Esperanto-uutisia hallitsi tammikuun alkupuolella Dolchamarin Rebela Sono -cd:n julkistaminen. Oikeasta kielivalinnasta johtuen levynjulkistamista ei juhlittu vain rock-lehdissä, vaan myös arkiset päivälehdet – Helsingin Sanomat, Turun Sanomat, Hufvudstadsbladet, Borgåbladet ja Karjalainen, joista leikkeet olivat hallussa (lehdet 9.-13.1.2005) – kirjoittivat levystä ja bändistä. Englannin-, suomen- tai ruotsinkielisen levyn julkaiseva kokoonpano ei pääse samalla tavalla esiin.

HS:ssa Rebela Sono esiteltiin Tapasimme -henkilöpalstalla Patrik Austinin haastattelun yhteydessä. Toimittaja tunnisti soitetuista kappaleista jotain espanjan, italian, venäjän ja englannin kielestä, mutta ei saanut siitä muuten tolkkua, kun ei ollut opiskellut esperanton perusteita.

Patrik arveli, että moni kuuntelee levyä huomaamatta, että ”siinä on jotakin outoa”.

Jutussa esitellään Patrikin tutustuminen esperantoon, kun hän asui 1990-luvun lopulla Englannissa ja siellä syntyneen musiikin julkistamisesta Lingvo intermonda -nimellä Ranskassa. Nyt Dolchamar on jo kuuluisuus esperantistien parissa, ja lähiaikoina näkee, miten musiikki kelpaa Suomessa. Levyn Patrik Austin tuotti itse äänityksestä lähtien, jakelu pitäisi vielä hoitaa.

HS:n mukaan hänen opintonsa ovat nyt jääneet vähemmälle monen muun työn rinnalla, mutta esperanton puolesta hän jaksaa puhua.

TS, HBL ja Karjalainen kirjoittivat Dolchamarista samantapaisesti. Esperanto on luova kieli ja antaa erilaisia mahdollisuuksia käyttää mielikuvitusta. Jutuissa D:n musiikkia luonnehditaan ”tanssirytmiseksi rokiksi, johon on sekoitettu etno- ja reggaevaikutteita sekä ripaus slaavilaista melankoliaa.” Kansainvälisenä bändinä Dolchamar saa fanipostia Japanista ja Kiinasta. Lehdissä mainittiin, että seuraavaksi he esiintyvät Suomessa heinäkuussa 2005 esperanton kulttuurifestivaaleilla Helsingissä. (Ks. ajantasaisempi keikkakalenteri s. 11.)

Lisäksi Turun Sanomat ja Karjalainen esittelevät lyhyesti Esperanton taustan ja sitä puhuvien ihmisten määrän. Esperanto-bändejä on maailmassa 50, kerrotaan lopuksi.

Borgåbladet esitteli Dolchamarin porvoolaisbändinä, joka laulaa esperantoksi. Haastateltu Patrik Austin arvioi, että esperanton käyttö lauluissa ei karkota kuulijoita, jos he vain pitävät musiikista. Kappaleissa on myös jammailua, ja musiikki ei ole vain rockia. Levyä myydään myös Porvoossa, kun sen jakelu levykauppoihin on saatu kuntoon. Seuraavaksi Dolchamar keikkailee Tavastialla maaliskuussa ja Gloriassa heinäkuussa.

Helsingin yliopiston neljä kertaa vuodessa ilmestyvä englanninkielinen Universitas Helsingiensis -lehti 4/04 esitteli Esperantoa otsikolla ”Esperanto – a language of equality”. Lehden haastattelussa skandinaavisten kielten opiskelija Patrik Austin kertoi taustansa esperanto-




***Kuvassa pieni osa Dolchamarin saamasta julkisuudesta – lehdissä, radiossa ja internetissä.***

harrastukselle. Englannissa oleskellessaan hän huomasi, miten angloamerikkalainen kulttuuri hallitsee ja kuinka merkittäviä asioita jää syrjään yhden kulttuurin maailmanlaajuisen hegemonian vuoksi, jos puhuu vain ”pieniä” kieliä. Tämä kannusti perehtymään esperantoon.

Esperantolla ei haluta syrjäyttää muita kieliä, vaan sen avulla pienetkin kulttuurit tulevat kuulluksi. Se on elävä kieli, Dolchamarin musiikkia soitetaan esperanto- ja etnofestivaaleilla sekä Helsingin diskoissa. D on maailman suosituin esperanto-bändi, arvioi Patrik. Se on kannustavaa.

Helsingin yliopistossa yhteinen maailmankieli on tullut vasta nyt ajankohtaiseksi. Yliopistoon on perustettu Esperanto-kerho, EsperHe, kertoo lehti. Lisäksi Universitas Helsingiensis esittelee Patrikin toimintaa erityispedagogiikan alalla opinnoissaan ja työssään, joita hän tekee opintojen ohella.

### Somerolla tapahtuu

Lokakuun 29. päivänä ilmestyneen Somero-lehden mukaan Esperantoa herätellään Somerolla, kun sen juuret ovat vahvat, mutta harrastus on ollut lamassa.

Somerolla käynnistettiin kansalaisopistossa esperanton alkeiskurssi, kun Suomen opettajien esperantoliiton puheenjohtaja Carola Antskog oli käynyt luennoimassa kielestä opistossa. Somerolaisista halutaan saada suomalaisryhmä Euroscolaan vuonna 2006, jolloin se vierailisi Strasbourgissa.

Toisena esperantistina lehdessä esiteltiin Juhani Vilkki, joka oppi kielen isältään saamistaan oppikirjoista. Kieltä hän oppi puhumaan Ruotsissa kesätöissä Malmön esperantokerhossa. Kielitaitoa hän pitää yllä kirjeenvaihdolla ulkomaille. Sitä on jatkunut vuosikymmeniä.

Somerolainen Eero Laine esitellään Somerolehdessä Esperanton delegitona. Hän oppi kielen Someron keskikoulussa Joel Vilkin ansiosta. Kieli unohtui, mutta nyt hän harrastaa sitä taas, ja kieliystäviä ja -tuttuja on tullut yhä lisää, mm. hänellä on sähköpostituttuja Togossa Länsi-Afrikassa.

*Jukka Noponen*

## Societo Nino Runeberg

Societo Nino Runeberg (SNR) estas la finna ekvivalento por Societo Zamenhof de UEA, do ĝi estas la societo de subtenantoj de EAF. La societo estis fondita en la 1980-aj jaroj laŭ la iniciato de Osmo Buller. Por aliĝi la societon oni pagas duoblan jaran kotizon de EAF. La societo honorigas per sia nomo al Hjalmar Johannes ”Nino” Runeberg (1874-1934), kiu estis la iniciatinto de EAF (fondita 1907) kaj ties unua prezidanto kaj honora membro. Li estis ankaŭ la unua finna kongresano partopreninte la unuan UK:n en Bulonjo-sur-Maro 1905. Li estis krome ekz. la iniciatinto de la societo Steleto kaj de la klubo Polusstelo.

Ek de la Vintraj Tagoj de EAF en Mikkeli 2002 Societo Nino Runeberg denove revivas. Dum la Vintraj Tagoj ek de tiam la societo aranĝas sabatvespere antaŭ la vespermanĝo akcepton kun ŝaumvino k.a. Aktivaj membroj de la societo ĉiam partoprenis la akceptojn, kiujn gastigis la asocia prezidanto kaj sekretario. La tradicio nun daŭros dum Vintraj Tagoj en Orivesi: la akcepto estos denove aranĝata tuj antaŭ la vespermanĝo, la ekzakta horo aperos en la programo. Se vi ne ankoraŭ estas ano de la Societo Nino Runeberg, sed volas aparte subteni la agadon de Esperanto-Asocio de Finnlando, bonvolu pagi la subtenantan sumon, 36 eŭrojn, al la Asocia konto (vidu paĝo 2). Membroj de SNR ne nepre devas esti esperantistoj nek membroj de EAF. Tiel kiu ajn, kiu simpatias la agadon de EAF kaj Esperanto-movadon, povas fariĝi membro. La estraro dankeme bonvenigas ĉiujn aliĝojn.

*La Estraro*

## Elsa Annikki Salovaara 24.8.1920 – 28.12.2004

Tri tagojn antaŭ la jarfino 2004 finiĝis la vivo de Elsa (Eija) Salovaara en Helsinki.

Devena hejmurbo de Eija estis Oulu, la urbo, kiun ŝi dum sia tuta vivdaŭro ame konservis en sia memoro. Ŝi naskiĝis tie la 24-an de aŭgusto 1920 kaj tie vivis en sia gepatra hejmo kaj studis ĝis la postmilitaj jaroj.

Interesokupoj de Eija estis legado kaj vojaĝoj. Ŝi partoprenis en multaj aŭtobus-karavanoj de la dana gvidanto L. Friis tra eŭropaj landoj, kaj estante admiranto de Laplando ŝi verkis ĉarman libron *Kie boacoj vagadas*, en kiu ŝi alloge rakontas pri superstiĉo kaj mistiko de la loĝantoj kaj pri beleco kaj sovaĝeco de la antaŭa Laplanda naturo. Eija havis bonan talenton rakonti interese pri siaj impresoj dum siaj en- kaj eksterlandaj vojaĝoj; i.a. en la libro *Sub la signo de la verda stelo*.

Funebra ceremonio al Eija Salovaara okazis la 12-an jan 2005 en Helsinki kaj la enterigo de la cindrujo en Oulu la 15-an. Krom la parencoj de Eija partoprenis ankaŭ Allan Mehtonen kiel longtempa amiko kaj reprezentanto de la Oulua E-societo.

*Allan Mehtonen*

## Aŭtunaj Tagoj vizitos Esperanto-Domon

Kunlabore kun Sveda Esperanto-Instituto la sekvaj Aŭtunaj Tagoj realiĝos en formo de vizito al la Esperanto-Domo (Esperanto-Gården) en Svedio. La junulargastejo-kursejo situas centre de Lesjöfors en Vermlando. Lesjöfors havas ĉ. 2 000 enloĝantojn kaj apartenas oficiale al la komunumo Filipstad. Lesjöfors troviĝas plimalpli samdistance de Gotenburgo, Oslo kaj Stokholmo, ĉ. 300 km.

Esperanto-Domo povas gastigi samtempe proksimume 85 tranoktantojn en 2-6-litaj ĉambroj. La kursejo estas posedata de koopera societo. Ĉiuj esperantistoj kaj simpatiantoj de esperanto rajtas esti membroj-posedantoj. En la ejo okazis interalie Kultura Esperanto Festivalo 1998 kaj Internacia Junulara Kongreso 2003.

Aŭtunaj Tagoj okazos dum semajnfino en septembro 2005. La ekzaktaj aranĝoj ankoraŭ ne estas fiksitaj.



## Esperantotemaj artikoloj en aliaj gazetoj

Memoru tuj sendi eltondaĵojn pri esperanto al la oficejo. Tie ili estas tuj arĥivigitaj tiel ke ili estas videblaj por nunaj kaj estontaj vizitantoj de nia oficejo. Ne gravas se ni ricevas pli ol unu de la sama gazetartikolo. Gravas ke ni ricevas la artikolojn, sed eĉ pli bone estas se ĉiu klubo nomumas respondeculon pri artikoloj en la gazetaro. Se vi ne volas sendi la originalon ankaŭ fotokopio bone taŭgas.

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti *ilkka.santtila@esperanto.fi* mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 taneli.huuskonen@netsonic.fi www.esperanto.fi/helsinki
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi.
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 💻 kari.kettunen@pp1.inet.fi
- Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. 💻 martti.pennanen@phnet.fi
- Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu.
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla. 💻 matti.wallius@ebaana.net
- Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstatie 37, 37500 Lempäälä, 💻 lauri.liukkonen@jippii.fi)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. 💻 tiina.oittinen@pp.inet.fi

- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. 💻 cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. 🖷 (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2005 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla, Hämeenlinnassa ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna**
**aperas dum la jaro** **2005**

| Nro | Red.grupo komencas | Limdato | Aperas |
|---|---|---|---|
| 2 | 1.3. | 15.3. | 5.4. |
| 3 | 1.5. | 15.5. | 5.6. |
| 4 | 1.7. | 15.7. | 5.8. |
| 5 | 1.9. | 15.9. | 5.10. |
| 6 | 1.11. | 15.11. | 5.12. |

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

## Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

| Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 e | 1/1 sivu/paĝo 50 e |
| 1/2 sivua/paĝo 60 e | 1/2 sivua/paĝo 30 e |
| 1/4 sivua/paĝo 40 e | 1/4 sivua/paĝo 20 e |

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

-----------------

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

## FEJOn lukijakilpailu

Joulukuun lehdessä olleeseen lukijakilpailuun ei tullut yhtään vastausta, joten yritetäänpä uudelleen lisävihjeillä. Kysymme siis, mitä yhteistä on Suomen Pankilla, Helsingin yliopistolla, Sosialidemokraattisella puolueella, suomalaisella vapaapalokuntaliikkeellä ja FEJOlla.

12. joulukuuta 1811 Suomen silloinen hallituskonselji antoi manifestin, jonka mukaan piti perustaa "Waihetus- Laina- ja Depositioni-Contori Suomen Suuren-Ruhtinanmaasa". Perustettua laitosta ruvettiin myöhemmin kutsumaan Suomen Pankiksi.

Ensimmäinen Suomen alueella toiminut yliopisto aloitti 15. heinäkuuta 1640. Sen varhaisvaiheen tunnemme nykyään yleensä nimellä Turun akatemia. Julkaisujen kielenä siihen aikaan oli yleensä latina, jolla paikka oli nimeltään Academia Aboensis. Vuodesta 1828 se toimi nimellä Keisarillinen Suomen Aleksanterin yliopisto, tosin sana yliopisto keksittiin suomen kieleen vasta vuonna 1847, sitä ennen lienee suomeksikin käytetty termiä "akademia". Vuodesta 1919 on toiminut nykyisellä nimellään Helsingin yliopisto.

17. heinäkuuta 1899 alkoi suomalaisten työväenyhdistysten edustajakokous, jossa perustettiin Suomen Työväen Puolue. Vuoden 1903 puoluekokouksessa se muutti nimensä Suomen Sosialidemokraattiseksi puolueeksi ja omaksui sosialistisen puolueohjelman.

Palontorjunnan järjestäminen palokunniksi tuli ajankohtaiseksi, kun kaupunkien asukasluvut alkoivat kasvaa yli kymmenentuhannen suuruusluokkaan ja suurten kaupunkipalojen tuhovaikutus kasvoi. Suomen ensimmäinen palokunta perustettiin vuonna 1838, mutta silloinen vallanpitäjä, Venäjän keisarikunta, ei pitänyt suomalaisten järjestäytymisestä palokunniksi ja salli vasta 1860-luvulla perustettavan lisää palokuntia.

Suomen Nuorten Esperantoliitto eli FEJO perustettiin EAF:n talvipäivien yhteydessä 26. helmikuuta 1977. FEJOa oli yritetty perustaa jo aiemminkin. Elokuussa 1973 oli nimellä Suomen Nuorison Esperantoliitto perustettu ensimmäinen FEJO, mutta sen toiminta hiipui pois ennen kuin sitä ehdittiin rekisteröidä.

Mitä yhteistä siis on Suomen Pankilla, Helsingin yliopistolla, SDP:llä, suomalaisella vapaapalokuntaliikkeellä ja FEJOlla? Edellä kerrottuihin asioihin sisältyy vihje oikeasta vastauksesta. Lähetä vastaus päätoimittajalle 15.3. mennessä, niin osallistut oikeaan vastaukseen liittyvän palkinnon arvontaan. *(mm)*

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuussa. Jutut 15.3.2005 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en aprilo. Artikoloj ĝis 15.3.2005 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <*eaflehti@esperanto.fi*>.

**Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2005**